# PRENU
# L
# U

Dua eldono, 2008

**GBEGLO**
**Koffi**

SAT-Broŝurservo / Laŭte:
FR 47470 Beauville *

Gbeglo Koffi insiste petis, ke mi verku antaŭparolon. Kial mi? Mi sentas min kiel amatoro apud profesiulo. Mi uzas Esperanton kaj povas klarigi ĝian uzadon pli-malpli al komencantoj. Tiel mi iam faris al Gbeglo Koffi. Jam de multaj jaroj li preterkreskis min. Mi vere ĝojas. Tiajn homojn ni bezonas en Afriko.

Ĉu en Afriko? Mi kuraĝas diri: en la movado. Malmultaj estas la profesiuloj, tiuj, kiuj travidas la mirindaĵojn de Esperanto kaj kapablas travidigi ilin al aliaj. Mi respektas tiujn, kiuj verkas dikajn librojn pri Esperanto. Sed mi ŝatas tiujn, kiuj verkas maldikajn librojn pri Esperanto, kiuj tamen estas profesiaj. Por serĉi la vojon oni povas uzi lumturojn kaj radarojn. Sed mi preferas poŝlanternon, tian elektran, pilan torĉon, kiun eĉ mi, eĉ infano povas facile utiligi por ne stumbli.
Mi ne scias kio estas pli malfacila: konstrui radaron aŭ konstrui taŭgan poŝlanternon. Mi esperas, ke tiuj lastaj estos ĉiam haveblaj, malmultekostaj kaj fidindaj.

Gbeglo Koffi preterkreskis min. Mi svingas al li la manon kaj diras: bonan plumigradon supren! Ekde nun aliaj gvidistoj helpu vin. Mi tre esperas, ke tiuj gvidistoj vere faros sian eblon. Tiel ili enkonduku sur la pinton de la parnasa monto novan kolegon. Gramatikiston, verkiston, instruiston, eĉ akademianon, iam.

Kiom bedaŭrinde, ke nia esperantista socio estas tiel malgranda! Ke famo en Esperantujo nenion signifas por la vasta mondo. Ke majstro-verkoj, eldonitaj en mil ekzempleroj pene vendiĝas. Feliĉe, Gbeglo Koffi ne aspiras famon en la vasta mondo. Li estas esence modesta homo. Nia kolegaro, nia amikaro sufiĉas al li. Tio estas tre grava. Mi tre esperas, ke tio ne ŝanĝiĝos.

Al la kompetentaj legontoj de tiu ĉi kajero mi petas: akceptu la taskon juĝi ĝin kaj doni vian konsilon al la verkinto. Li meritas la investon de via tempo. Mi rekomendas lin al vi.

**H. Bakker**

Amsterdam, la 20-an de aŭgusto 1990-a.

*De la 27-a de junio ĝis la 3-a de septembro 1989, mi pasigis Abundajn Du Monatojn (adm-o) en la urbo SOMERO de Finnlando. Mia adm-a restado en tiu lando okazis pro kaj por Esperanto. Mi lernis pri Esperanto, religiaj aferoj, kaj pri natura nutrado. Mi ne forgesu mencii, ke la adm-o helpis al mi partopreni en la kongreso de Brajtono; tien mi iris kune kun miaj finnaj gepatroj Hemmo kaj Veera TIETTI.*

*La kialo de mia vojaĝo al Finnlando koncernis ĉefe mian enprofundiĝon en aferojn pri Parapsikologio kaj natura nutrado. Per leteroj, Hemmo kaj Veera priskribis tiujn aferojn al mi, kaj ankaŭ mi respondis pri miaj enkapigitaĵoj. Malgraŭ tiu perletera kontakto, multaj punktoj tiutemaj ĉiam nebulas por mi. Do, mia restado en SOMERO estis bonfara, ĉar Hemmo, Veera kaj mi buŝ-al-buŝis unu la aliajn. Mi sukcesis kolekti multajn informojn pri punktoj antaŭe al mi malklaraj. Mi interesiĝas ĉefe pri religiaj aferoj, kaj la admo malfermis aliajn okulojn al mi. Tiuj pliaj okuloj montris al mi, ke mia unua verkaĵo "**Mia Kredado**" ne plu kongruas kun mia nuna idearo. Ĉar mi ne povas ĝin reformi, mi decidis verki plian, kaj poste pliajn. Anstataŭ nura "**Mia Kredado**", samklubano DWEGGAH-MILAVO Dolayi, aŭdinte miajn vortojn pri religiaj aferoj, rimarkis, kiel mia kredado varias tagon post tago, kaj tial proponis la titolon "**Mia Kredado I**". Tio montras, ke aliaj "**Mia Kredado**" venos, kion mi nun konfirmas, ĉar la instruoj de Hemmo kaj Veera helpis min malkovri aliajn facetojn de la religia tereno. Min tre kontentigas la admo. Mi ne forgesis samideanojn, kaj precipe samlandajn, kiuj rajtas profiti el mia restado en Finnlando. Necesis do, ke mi kunportu ion de Finnlando al ili, ĉu ne? Kion do?*

*Pri la naturo de la donacoj mi cerbumadis. Ĉu horloĝojn mi kunportu? Ĉu librojn, vestojn? Kiom da tiuj aĵoj mi prenu, kaj kiom peza estus mia valizo? Ĉu miaj amikoj plene profitus el tiaj donacoj mallongdaŭraj? Post longa pripens-*

*ado, mi decidis verki ian lernolibron, kies ekzempleron mi disponigus al ĉiu el ili. Tiam mi proponis al mi tralerni la kurson FEREZ, kiun Afrikaj landoj uzas por esperantistiĝi. Tiu rapida tralernado ebligis al mi verki foliaron, kiun mi multobligis (per la helpo de s-ro Teuvo RONKAINEN, el SALO, Finnlando), kaj kunportis la originalon de Finnlando al Togolando.*

*"**Prenu plu**" estas por ĉiuj Esperantistoj, ĉar kelkaj lernos per ĝi, dum multas lernigos per ĝi. Mi mem ne miras pri mia noviceco, tial, finskribinte kaj multobliginte la manuskripton, mi sendis ekzemplerojn al kvar elstaraj Esperantistoj, kiuj ĉiam helpas min lernadi. Ĉiun ekzempleron akompanis letero, kiu klarigis pri la celo kaj strukturo de la foliaro. (Mi ĉemetas ekzempleron de tiu letero). Kvankam mi sendis kvar pakaĵojn [4 x (kopio de la manuskripto + akompana letero)] tamen kvar respondoj atingis min. Tiu "kvankam" klarigas, ke tiuj KVAR ne estas egalaj, ĉar ne ĉiuj adresitoj miaj respondis, sed kelkaj, al kiuj aldoniĝis aliaj helpantoj, kiuj de alia fonto ricevis po unu ekzempleron de la foliaro. Finfine atingis min respondoj de s-roj J.P. BEAU, Hans BAKKER, R. MOERBEEK kaj R. MARAIS. Ili ĝisfunde ekzamenis la manuskripton kaj faris multajn proponojn. La plejparto de iliaj komentoj estas samaj. Mi ne kaŝu, ke kelkafoje proponoj iliaj estis malsimilaj, kaj tiam, por havi la definitivan formon, mi elektis laŭ la principo "la plejparto el tuto ĉiam pravas". Tio signifas, ke, kiam la proponoj de du kongruas kun mia skribaĵo, tiam ni tri pravas antaŭ la aliaj, ĉar tri (plejparto) el kvin (tuto). Tiel, mi provis aranĝi la manuskripton, kies konkretiĝo estas la libro, kiu nun estas antaŭ vi.*

*Skribante tiun antaŭparolon, miaj pensoj flugas al:*
- *Miaj finnaj gepatroj Hemmo kaj Veera TIETTI, kiuj ĉiam helpadas min, por ke mi plu kaj pli luktu por Esperanto, kaj partoprenu en la evoluigo de la homaro.*
- *S-roj H. BAKKER, J.P. BEAU, R. MOERBEEK kaj R. MARAIS, kiuj respondis mian alvokon tralegi la manuskripton, kaj sin deklaris ĉiam pretaj plu kaj pli helpi.*

*AL ĈIUJ PERSONOJ MI ŜULDAS MAMUTAN DANKON.*

*Fine, per **Prenu plu**, mi omaĝas la tutan Esperantistaron Afrikan, spronante ĉiujn klopodi verki ion, por ke nia nigra verdmondo ekfloru.*

*La letero, kiun mi ĉemetas al tiu ĉi antaŭparolo, estas ankaŭ por vi, karaj legantoj. Mi ĝoje atendas viajn komentojn kaj kritikojn, por ke venontaj tiaj lerniloj estu pli efikaj.*

*G.K.*

*Julio 1990.*

*Somero, la 1-an de septembro 1989.*

*Kara gvidanto,*

*"**Vi** kaj mi estas (se ni volas) gvidatoj, ne gvidantoj, instruatoj, ne instruantoj. Tamen, tiel kiel lernantoj en la klaso povas lerni unu de la alia foje anstataŭe de la instruanto, tiel ankaŭ niaj verkaĵetoj povas interhelpi nin reciproke", skribis al mi fidinda, laborema, sagaca, senlaca amiko kaj gvidanto.*

*Jes, mi ĉiam lernas, kaj mi lernas de ĉiu, eĉ de ĉio ajn, ĉar, observante ion aŭ iun, aŭ aŭdante ion aŭ iun, mi ĉiam sentas, ke eniras en min ia fajreto, helpanta min stampi ion, kio antaŭe restis al mi nebula, eĉ entenebra.*

*Tiu ĉi foliaro, kiu nun troviĝas en viaj manoj, celas pli mian plulernadon ol mian instruetadon. Per viaj korektoj, komentoj, konsiloj, kritikoj ktp., vi malfermos al mi alian horizonton. Tiuj eraroj miaj, kiujn mi ne jam korektis mem, kaj kiujn nun vi montros al mi, estos de mi forviŝitaj de mia lernado, de mia pensado.*

*Do, mi petas de vi, ke vi ĉiapunkte ekzamenu ĉi tiun foliaron, por ke ĝi povu en la venontaj monatoj helpi al mia perfektiĝado kaj mia perfektigado.*

*Por la foliaro mi proponas la titolon "**PRENU PLU**". Ĝi enhavas tri partojn. Verkante ĝin, mi pensas pri samkursanoj, kiuj esperantistiĝis per la kurso FEREZ (s-ro Hans BAKKER scias multon pri tiu kurso).*

*Finstudante tiun kurson Francan/Esperanton, la lernanto havas problemojn pri multaj gramatikaĵoj, kiuj tamen devus esti regataj. Tiujn erarojn kaŭzis la fakto, ke dum la lernado la kursano devis traduki de Esperanto al la Franca kaj reciproke. Tiam, tiuj komencantoj kontentigis sin per laŭvorta tradukado. Per mia kajero mi celas malkovri pliajn miajn erarojn, kaj disponigi la korektitaĵojn al kunlernantoj miaj. Vi vidos mem, ke la kajero havas tri partojn:*

*1 - REVIZIU*
*Surbaze de la kurso FEREZ, mi reviziigas kaj aldonas gramatikajn punktojn, kaj poste proponas ekzercojn.*

*2 - STAMPU*
*Mi reprenas (laŭ mi pli detale) punktojn, kiujn miaj posteuloj misuzas. "Instruisto devas ripetadi", tial mi du-, eĉ trifoje parolis pri sama(j) temo(j).*

*3 - ALDONAĴOJ*
*Mi klopodis enmeti notojn pri ĉiutagaĵoj (mezurunuoj, interjekcioj) kaj montris kiel mi konsultas miajn vortarojn.*

*Via tasko nun estas:*

- *Korekti,*
- *Kritiki, komenti,*
- *Proponi, eĉ postuli*
  - *kiujn punktojn mi forigu,*
  - *kion mi aldonu,*
  - *kiel reordigi la ĉapitrojn.*

*Mi konfidas nun la evoluigon de nialanda Esperanto-movado al vi. Ne forgesu, ke "neniu instruisto povas doni pli ol li scias"; do, perfektigu min, por ke miavice mi perfektigu aliajn.*

*Bonan suplementan laboron al vi kaj antaŭdankon.*

*Via ĉiama lernanto kaj helpato,*

***GBEGLO Koffi***

# reviziu

*"Volanta kruro ne laciĝas de kuro"*

# UNUA LECIONO

1. Alfabeto

a) La alfabeto Esperanta konsistas el 28 literoj: **a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.**

b) - La vokaloj estas: **a, e, i, o, u.**
- La konsonantoj estas: **b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, h, ĥ, j, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, ŭ, v, z.**

2. Prononco

a) La literoj de la alfabeto

Ne ekzistas absoluta regulo pri la elparolo de la literoj, sed laŭ la **Fundamenta Ekzercaro** la elparolo estas la jena: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.
Ekzemple: la literumado de la vorto AMINDA estas:
A-Mo-I-No-Do-A

**EKZERCO:** Literumu ĉiujn vortojn de la jena teksto!
La Esperantistoj estas amikoj de la mondo. Tial, neniu batalo povas okazi en Esperanto-Rondo, ĉar ĉiuj komprenas unu la aliajn. Kie homoj kolektiĝas, tie malmankas disputoj. Ĉu la sekva diraĵo ne estu al ni utila? "Agu kun la aliaj tiel, kiel vi volas, ke oni agu kun vi."

b) Legado de ĉiu vorto

Ĉiun vorton oni prononcu, kiel ĝi estas skribita. La akcento troviĝas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.
Ekzemple: amiko; tabulo; ministo; ĵaŭdo; fraŭlo; praulo.

Rimarko 1: Pri la prononco de "fraŭlo" kaj "praulo" oni povas esti iom ŝokita. La vorto PRAULO havas tri silabojn

(pra-ul-o) , dum FRAŬLO, du (fraŭl-o).

Notindas, ke vokalo povas formi sola silabon, kio ne povas okazi ĉe konsonanto; ĝi devas esti ĉiam kun vokalo por formi silabon.
Ekzemple: amiko : tri silaboj; eto : du silaboj; peto: du silaboj. En AGO kaj TAGO estas du silaboj.

Rim.2: Atentu pri la literoj **i** kaj **j**.
Legu la jenajn frazojn, kaj notu la diferencon:
- Mi **jam** manĝis. Mi **iam** manĝis.
- **Ju** pli **iu** koleras, des pli li vundas sian koron.
- Ĉu Esperanto estas **ies** elpensaĵo? **Jes**, ĝi estas.
- **Jen** la libro. Metu ĝin **ien** ajn.

Rim.3:
a) Ĉu vi memoras la regulojn pri la legado de: **ai, au, an, am, ei, eu, en, em, oi, ou, om, on,** ktp.?
Ĉiu litero estu aparte prononcata!
b) Legu laŭte: horo - oro ; umo - humo. Kion vi rimarkas?

3. Artikolo

Nur unu artikolo ekzistas en Esperanto. Ĝi estas **LA.**
Ekzemple: La tablo - la tabloj ; tablo - tabloj.
"La tablo(j)" estas difinita, jam konita kaj aparta, dum "tablo(j)" ne-difinita, iu ajn.

Rim.4: Antaŭ nomojn proprajn kaj landajn oni ne metu la artikolon **LA.**
Ekzemple: Esperanto; Francio; Togolando; Venuso; Marso; Petro; ktp.
(Bonvolu konsulti la duan parton de la libro: "ARTIKOLO")

**EKZERCO:**

1. Laŭtlegu tradukitaj en vian nacian aŭ/kaj oficialan lingvojn, la jenajn frazojn:

a) Lernanto estas atenta.
b) La lernantoj estas atentaj.
c) Lernantoj manĝas, dum la lernejestro ripozas.
ĉ) Ĉu estas vino en la glaso? Ĉu la vino estas ruĝa? Estas blanka vino.

d) Donu al mi sukerpecojn. La sukerpecoj estas blankaj.
e) Mi trinkas teon.

2. Skribu plurale la vortojn de la jenaj frazoj:

a) La libro kuŝas sur la tablo.
b) Sukerpeco estas en glaso.
c) Lernanto kuras en la ĉambro.
ĉ) La kapo de la viro estas granda.
d) Hundo kaj kato havas dometon.
e) La amiko ŝatas trinkaĵon.

3. La sekvaj frazoj estas respondoj de demandoj. Bonvolu fari la demandojn.

a) Jes! KOFI kuŝas.
b) Ne! JAO ne kuŝas, sed JAO staras.
c) Ne! KOKU ne manĝas, sed trinkas.
ĉ) Jes! KOKU trinkas.
d) Jes! KOKU trinkas akvon.
e) Ne! KOKU trinkas ne brandon, sed akvon.

==******==

*"Pli bone estas reiri, ol perdi la vojon."*

*"Al bona ĉasisto iras mem la besto."*

# DUA LECIONO

1. Substantivo, adjektivo, verbo kaj adverbo

**EKZERCO 1:** Listigu po dek verbojn, substantivojn, adjektivojn kaj adverbojn.

NOTU, ke:
"**o**" estas la finaĵo de la substantivoj,
"**i**" estas la finaĵo de la infinitivaj verboj,
"**a**" estas la finaĵo de la adjektivoj,
"**e**" estas la finaĵo de adverboj.

2. Personaj pronomoj

**EKZERCO 2:** Listigu tiujn pronomojn.

Rim.1:
a) Anstataŭ "**ci**" oni uzu "**vi**". Malofte oni renkontas "**ci**", kaj preskaŭ nur en poezio.
b) Kiam temas pri "iu", kies sekson oni ne bezonas precizigi, tiam oni uzas "**ĝi**".

Ekzemple: La homo venas; ĝi venas. La infano dormas; ĝi dormas.

c) Uzu ĉiam "**ĝi**" ankaŭ por bestoj, kies sekson vi ne scias.

Ekzemple: La kato saltas; ĝi saltas. La koko klukas; ĝi klukas.

SED: La virkato manĝas; li manĝas. La kokino klukas; ŝi klukas.

3. Posedaj adjektivoj

**EKZERCO 3:** listigu la posedajn adjektivojn! **Mia, via,...**

Rim.2: Voĉo de virino = virina voĉo
La ĝardeno de instruisto = la instruista ĝardeno.

DO: Oni povas iri de "X-o de Y-o" al "Y-a X-o", kiam la transformo ne igas la frazon malklara. En kazo de dubo, pli bonas konservi la formon "X-o de Y-o".

Ekzemple: Tasko de instruisto = instruista tasko
X-o de Y-o = Y-a X-o
La manoj de homo = la homaj manoj

SED, ĉu:

La hundaj dentoj = la dentoj de la hundo, **aŭ**, la dentoj de hundo, **aŭ**, la dentoj de la hundoj, **aŭ**, la dentoj de hundoj?

**EKZERCO:** Kompletigu per personaj pronomoj aŭ adjektivoj:

a) La piedoj de la tabloj estas altaj; .................. estas altaj.
b) La kato estas bela; .................estas bela.
c) La haroj de la lernantoj estas mallongaj; ............... haroj estas mallongaj.
ĉ) Ni loĝas en blanka domo; ..................domo estas blanka.
d) KOFI, JAO kaj KOKU ridas: ............. ridas.
e) ANANI, KOĜO kaj mi kantas: ........... kantas.
f) La folioj de la arboj estas flavaj; ......................... folioj estas flavaj.
g) La dentoj de la hundino estas akraj; ..................... dentoj estas akraj.
ĝ) La dentoj de KOFI estas blankaj; .......................... dentoj estas blankaj.
h) La kajero de la lernantino estas pura; ........... estas pura; ..................kajero estas pura.

4. Posedaj pronomoj

Per aldono de la artikolo al ĉiu poseda adjektivo, oni formas la posedajn pronomojn.

Ekzemple: la mia; la via; la lia; la nia, ktp.
Mia libro estas blanka; la via estas ruĝa.
Via patro kuras; la lia dormas.

Rim.3: La posedajn adjektivojn oni uzas ankaŭ kiel pronomojn.

Ekzemple: Via libro estas pura; (la) via estas pura.
Nia lernejo estas granda; (la) nia estas granda.

==*******==

*"Se mi faru riverencon, mi elektas potencon."*

*"Liveru nur panon, manĝontoj sin trovos."*

# TRIA LECIONO

1. Konjugacio

La finaĵo de la infinitiva verbo estas "**i**". Por konjugacii, oni forigas tiun finaĵon kaj ĝin anstataŭigas per la finaĵo de la proponita tempo.
"**as**" estas la finaĵo de la prezenco,
"**is**" estas finaĵo de la preterito (pasinta tempo),
"**os**" estas la finaĵo de la futuro.

**EKZERCO:** Metu la ĝustajn finaĵojn.

a) Hodiaŭ mi bone fart.....
b) Morgaŭ vi ir..... al ANEHO.
c) Hieraŭ ili ĉeest..... Esperantan kurson.
ĉ) Kiam mi estis infano, mi ĉiam plor......
d) Kiam okazos Universala Kongreso en Togolando, tiam multaj afrikanoj ĝin partopren.....
e) Ĉu vi pov..... nun labor....? Mi demandas vin pro tio, ĉar hieraŭ vi est.... malsana, kaj morgaŭ vi reir..... al malsanulejo.

Rim.1: Post helpverboj "devi, povi, voli, ŝati, iri", k.s. oni uzas la infinitivon.
Ekzemple: Provu trovi pliajn tiajn verbojn!
Ĉu vi ŝatas naĝi? Mi povas interesigi vin pri tio.

2. Demandaj frazoj

a) Oni uzas "**Ĉu**" por fari demandojn, kies respondoj estas JES aŭ NE, aŭ eventuale MI NE SCIAS.
Ekzemple: Ĉu vi manĝas? Jes, mi manĝas? Ne, mi ne manĝas. Ĉu li estas instruisto? Mi ne scias (ĉu li estas instruisto). Ĉu la lernantoj estas atentaj? Mi ne scias, ĉu ili estas atentaj.

Rim.2: Notu la uzon de **ĉu** en la du lastaj respondoj. Oni povas ĝin uzi en senco de dubo aŭ necerteco.

Ekzemple: Cu via patro iros al ANIRONKOPE?

Respondoj: Mi ne scias, ĉu li iros al ANIRONKOPE.
Mi demandos lin, ĉu li iros al....
Mi dubas, ĉu li iros ....
Mi vidos, ĉu li iros al....

b) Ekzistas aliaj demandaj vortoj: **kie, kiu, kia, kio, kiam, kiel, kiom, kies**, kaj derivaĵoj iliaj.

Ekzemple: Kiu manĝas? KOĜO manĝas.
Kio estas sur la tablo? Kajero estas sur la tablo.
Kiaj estas viaj haroj? Ili estas blankaj.
Kioma horo estas? Estas la dua (horo).
Kiel vi manĝas? Mi manĝas malrapide.
De kie vi venis? Mi venis de la kamparo.
Al kiu apartenas tiu pilko? Al la tie staranta bubo.

**EKZERCO:**

1. Legu la sekvan tekston kaj poste respondu la demandojn.

KOĜO kaj KOFI sidis ĉe tablo. Kelkajn minutojn poste, JAO kaj lia hundo venis al ili. KOĜO kaj JAO manĝis panon, dum KOFI trinkis kafon. Estis tiam la deka horo. Je la dekdua horo, KOKU, la amiko de JAO, vizitis ilin.

Demandoj:
a) Kie estis KOFI kaj JAO? b) Ĉu KOFI staris?
c) Ĉu JAO sidis? ĉ) Kies hundo estis apud KOFI?
d) Kiu estas la amiko de KOKU? Kiam KOKU vizitis ilin?
f) Kiujn vizitis KOKU? g) Kial KOFI ne manĝis?

2. Faru demandojn, kies respondoj estas la jenaj:

a) KOFI kantas. .b) ALI estos en la ĝardeno.
c) Krajono kuŝas sur la tablo. ĉ) Du kaj unu estas tri.
d) Hieraŭ MBALA estis malsana. e) Mi estos ĝoja.
f) La lernanto ploras, ĉar la instruisto lin vipis.
g) Hieraŭ mi multe dormis.

3. a) Faru frazojn, uzante jenajn vortojn: malmulte da; multe da; tie; tie ĉi; ĉar.
b) Faru demandojn, kies respondoj estas la de vi faritaj frazoj en (a).

Rim.3:

a) **KIU? KIO?**

KOFI kaj la hundo estas en la ĉambro: kiu estas en la ĉambro? Kio estas en la ĉambro?

Ĝenerale, oni uzas **KIU** (kaj ĝiajn derivaĵojn) por persono(j), kaj **KIO** por bestoj kaj objektoj. Sed notindas, ke:

- **KIO** estas uzata por homoj, kiam oni deziras scii pri iliaj profesioj, okupoj.
  Ekzemple: Kio vi estas? Mi estas panisto.
- **KIU** estas uzata, kiam oni celas iu(j)n afero(j)n inter pluraj.
  Ekzemple: Estas du libroj sur la tablo; kiu estas la via?
  Tri viroj sidas en la ĉambro; kiu el ili estas via instruisto?

b) **KIA? KIEL?**

Notindas, ke kia-demandon oni respondas per adjektivo, kaj kiel-demandon per adverbo (aŭ adverba komplemento).

Ekzemple: Kia vi estas? Mi estas dik**a**.
Kiel vi manĝas? Mi manĝas malrapid**e**.
aŭ: Mi manĝas **per forko.**

c) **KIES?**

Ĝi celas indikon de posedanto.

Ekzemple: Kiel filo vi estas? (nomoj de viaj gepatroj)
Kies gepatroj estas NANA kaj BURUKU?
Kies libro kuŝas sur la tablo?
Kies elpensaĵo estas Esperanto?
Kies panon vi manĝis?

MEMORU, KE:

- Oni promenas, ne "EN", sed "SUR" strato.
- Oni pensas, ne "AL", sed "PRI"....
- Estas diferenco inter Vetero kaj Tempo.
- Tre malgranda tablo estas tableto.
- Oni povas paroli PRI, AL, KUN.

komparu: Mi parolas al vi.
Mi parolas kun vi.
Mi parolas pri vi.
Ĉu "Mi" kaj "Vi" parolas en la tri frazoj?
Pravigu la respondojn.

-=-=-=-=-=-

Poemeto: **RIGARDUMO**

Miraklo!
Ŝajna ŝajno.
Muŝo ne eniru tiun faŭkon,
Kaj salivo ne pluvu el ĝi.

Kial miri nun?
Ĉu ne tio normalas?
Jes, stranga ĝi estas,
Tamen vera kaj reala.

Noveca novo,
Mirakleca miraklo,
Vereca vero,
Ĉar nun ĉio estas en ordo.

==**********==

*"Kara estas dono en minuto de bezono."*

*"Pli bona estas malgranda "**Jen prenu!**"*
*ol granda "**Morgaŭ venu!**".*

# KVARA LECIONO

1. Konjugacio

La imperativo aŭ u-modo estas signita per la finaĵo "**u**".
Ekzemple: Manĝu! Ni manĝu! (ke) ni kuru! (ke) ili lernu!

Rim.1: Tiu u-modo estas en Esperanto tio, kion oni nomas la VOLITIVO.

2. La akuzativo

En Esperanto, la (fleksia) rekta objekto (komplemento) estas signita per la finaĵo "**n**".
Ekzemple: Mi manĝas pano**n**. Mi amas mia**jn** gepatro**jn**.
Ĉu homo malamu malpaco**n**?

Rim.2: Tiu finaĵo "**n**" gluiĝas al la demandaj vortoj KIO, KIA, KIU, KIOMA, ktp, kiam la respondo de la demando estos rekta objekto.
Ekzemple: Kio**n** vi manĝas? Panon (mi manĝas).
Kiu**n** vi amas? (Mi amas) Petron.
Kiaj**n** okuloj**n** ili havas? Bluajn okulojn (ili havas)

Rim.3: Mi estas lia frato.
Ĉu en tiu frazo estas rekta komplemento? Tute ne. Do, oni ne rajtas meti "**n**" ĉe la finon de "lia frato", nek de "Mi", ĉar "mi" aŭ "lia frato" povas esti subjekto aŭ predikativo de "estas".
Konklude: Oni ne uzas la akuzativan finaĵon "**n**", kiam oni parolas pri esto, kvalito, ŝajniĝo, ktp.
Menciindas, ke ESTI, ŜAJNI, RESTI, ASPEKTI kaj IĜ-verboj ne toleras rektan komplementon.
Ekzemple: Mi fariĝis Esperantisto. Li ŝajnas lernanto atenta.

Rim.4: Kiam la rekta objekto havas predikativon, tiu ĉi ne alprenas la akuzativan signon.

Ekzemple: Mi konstatis lin bona. Mi ŝatas la teon varma.
Li faras la taskojn seneraraj.

KOMPARU: Mi trovis afablan lernanton
**kaj** Mi trovis afabla lernanton.

En la unua frazo oni povas kompreni, ke estas multaj lernantoj afablaj, el kiuj iun mi trovis. En la dua frazo, komprenindas, ke "mi trovis, ke lernanto estas afabla". Do, en tiu ĉi frazo "afabla" estas predikativo, dum en la alia "afabla" estas epiteto.

**EKZERCO:** Klarigu la diferencon inter la frazoj de la sekvaj frazparoj.

a) Mi vidis la homon mortintan. Mi vidis la homon mortinta.
b) Mi deklaris la taskon senerara. Mi deklaris la taskon seneraran.
c) Mi kredas lin kulpa. Mi kredas lin kulpan.
ĉ) Mi aŭdas ŝin kantanta. Mi aŭdas ŝin kantantan.

Sciigo: La predikativo objekta oftas kun la verboj, kiuj esprimas opiniojn, konstatojn, ktp, kaj ankaŭ kun kelkaj agverboj.

Ekzemple: Mi deklaris lin senkulpa. Mi vidis lin dormanta.
Oni faris lin instruisto. Tiujn punktojn li indikis gravaj.

Sekvas nun kelkaj tiaj verboj: kredi, vidi, trovi, deklari, opinii, aŭdi, konstati, elekti, nomi, fari, igi, ktp.

Rim.5: Post **DA** (kiel ankaŭ post la aliaj prepozicioj) la objekto ne alprenas "**n**".

Ekzemple: Mi havas multe da amikoj. Doni al mi iom da pano.
Li trovis kelke da bonaj libroj.

SED: Mi havas multaj**n** libroj**n**.
Oni devas uzi la akuzativan "**n**", ĉar **DA** ne estas tie.

Rim.6: Atentu pri inversio de subjekto!
Mankas mono al mi. Vidas mi. Jenas la respondoj.
Ĉu ekzistas sespiedaj bestoj en iuj landoj?

Informo grava: Vidu la okan lecionon por pliaj paŝoj pri la akuzativo.

**EKZERCO:**

1. Traduku en vian nacian aŭ/kaj oficialan lingvon.

a) Donu al mi panon! b) Skribu al mi leteron!
c) Vi permesas al mi manĝi.
ĉ) Parolu al mi pri viaj problemoj!
d) Kion vi intencas rakonti al mi?
e) Mi sendos al vi bonan fotilon.
f) Ĉu vi jam prezentis al mi vian tre amatan amikinon?

Reesperantigu viajn tradukaĵojn! Ĉu vi rimarkas ion?

2. Metu la finaĵon "**n**" kaj precizigu kaj la subjekton kaj la objekton.

a) La lernantoj instruas la instruisto.
b) La kokoj glutas maizgrenoj.
c) Li amas ili. ĉ) Kiu vi vidas?
d) Ĉu vi amas via patro? e) La pano manĝas la infano.

3. Kompletigu la jenajn frazojn:

a) Mi vidas ...... la okuloj. b) Tre granda tablo estas tabl....
c) ...... la manoj mi prenas panon, kaj ĝi.... donas ....KOFI.
ĉ) Tre varma akvo estas akvo varm......
d) Kukego estas .......... kuko.
e) .......... viaj longaj piedoj vi iras al la kongreso .... ne-kombitaj haroj.

4. AĜO rigardas KOĜOn kun bluaj okuloj.
AĜO mordas KOĜOn per akraj dentoj.

Kiu havas bluajn okulojn, akrajn dentojn? Pravigu la respondojn.

==*****==

*"Forĝu feron, dum ĝi estas varmega."*

*"Vortojn ŝparu, agojn faru."*

# KVINA LECIONO

1. Vortfarado en Esperanto

En ĉiu vorto estas radiko. La radiko estas la esenco de la vorto, al kiu povas aldoniĝi finaĵoj, afiksoj, kaj eĉ aliaj radikoj.

a) Aldono de finaĵo

**AM** estas radiko. Aldonante la finaĵojn "**i**", "**o**", "**a**" aŭ "**e**", oni formas respektive la verbon "**ami**", la substantivon "**amo**", la adjektivon "**ama**", kaj la adverbon "**ame**".

Tiel, en la vorto FRATO, FRAT estas la radiko.

La ĉefaj finaĵoj estas "**i**" por la infinitivaj verboj, "**a**" por la adjektivoj, "**o**" por la substantivoj, "**e**" por la adverboj, "**j**" por signi la pluralon, "**n**" por akuzativigi, kaj "**as**", "**is**", "**os**", "**u**" kaj "**us**" estas konjugaciaj finaĵoj de la prezenco, preterito, futuro, volitivo kaj kondicionalo.

Laŭ la finaĵo aldonita al la radiko, oni povas formi aŭ substantivon, aŭ verbon, aŭ adjektivon, aŭ adverbon, ktp.

Ekzemple: El la radiko FIN oni povas formi FIN**i**, FIN**a**, FIN**o**, FIN**e**. Ĉu vi povas pluekzerci per la jenaj radikoj: kant, parol, lern, ĝoj?

b) Aldono de alia radiko

Temas pri kunmetitaj vortoj, pri kiuj estos parolate en la sesa leciono.

c) Aldono de sufiksoj

Ekzistas duspecaj afiksoj:

- Prefiksoj.

Ili estas la afiksoj, kiujn oni povas aldoni al la komenco de radiko. La ĉefaj estas: **bo, ek, ge, re, fi, pra, eks, mis, mal, dis.**

- Sufiksoj

Sufikso estas afikso, kiu aldoniĝas al la fino de radiko.

La ĉefaj estas: **aĉ, ad, aĵ, an, ar, ĉj, ebl, ec, eg, ej, em, er, estr, end, et, id, ig, iĝ, il, in, ind, ing, ism, ist, nj, obl, on, op, uj, ul, um.**

**EKZERCO:**

a) Klarigu la uzon de ĉiuj afiksoj.
b) Faru vortojn, kiujn vi uzos en frazoj.

2. ĈU VI MEMORAS, **KE:**

a) La gepatroj konsistas nur el la patro kaj patrino, dum parenco estas persono, kiu havas kun alia persono komunan antaŭulon?

Ekzemple: Via patro estas unu el viaj gepatroj. Li estas ankaŭ parenco.
Via onklo estas parenco, sed ne unu el viaj gepatroj.

b) HOMO havas vastan signifokampon.
VIRO estas HOMO, ankaŭ VIRINO. Kiam oni diras: "Homo ne mensogu", tiu "homo" estas aŭ/kaj VIRO, aŭ/kaj VIRINO. Se oni volas paroli pri vira homo, oni diru nur "VIRO". Se temas pri ina homo, nur VIRINO estu uzata. Malkonsilendas la uzado de Homino anstataŭ VIRINO, kaj Homo anstataŭ VIRO.

Aldonindas, ke foje oni povas uzi la vortojn "**persono**" kaj "**individuo**" kiel la vorton "HOMO".

c) La vortoj **ANKAŬ, EĈ, NUR,** kaj **NE** devas ĉiam resti ĝuste antaŭ la vorto, al kiu ili rilatas.

KOMPARU: Mi manĝas ankaŭ panon.
Mi ankaŭ manĝas panon.
Ankaŭ mi manĝas panon.

Ĉu vi rimarkas diferencojn? Anstataŭigu la vorton ANKAŬ per ĉiu el la aliaj tiaj vortetoj kaj faru same.

Konsilo: Konsultu la duan parton de tiu ĉi kajero pri afiksoj kaj prepozicioj.

-=-=-=-=-=-

Anekdoto:

Malsaĝulo sidas ĉe strato. Ekvidante alian malsaĝulon, li monologas: "Kion mi ekvidas? Ĉu homon? Mi ĉion vidos en mia vivo, antaŭ ol morti. Rigardu, kiel li marŝas, kaj kiajn vestojn li surhavas. Eĉ besto li ne estas, nek objekto.

Se mi estus la urbestro, mi ordonus, ke oni mortigu ĉiujn malsaĝulojn, ĉar tiaj estuloj malpurigas la urbon kaj hontigas la urbanojn."

==*****==

*"Se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron."*

*"Kiu ne estas kaporalo, ne estos generalo."*

# SESA LECIONO

1. Kunmetitaj vortoj

En Esperanto oni povas formi novan vorton, kunmetante plurajn radikojn.
Ekzemple: Kapdoloro; skribmaŝino; dentokarno; poŝmono; ktp.
Rimarkindas, ke KAPDOLORO estas doloro de kapo, kaj SKRIBMAŜINO, maŝino por skribi. DOLORO donas sian tutan sencon al la kunmetita vorto KAPDOLORO, dum KAPO karakterizas la doloron: DOLORO estas la ĉefelemento de la kunmetaĵo KAPDOLORO, dum KAPO estas flankelemento aŭ aldona elemento. En SKRIBMAŜINO, MAŜINO estas la ĉefelemento, kaj SKRIB, la flankelemento, kiu kvalifikas la vorton MAŜINO.

**EKZERCO:** Trovu la ĉef- kaj flank-elementojn kaj klarigu la kunmetitajn vortojn: manlaboro; maŝinskribo; labormano; terkulturo; sunbano.

Rim.1: Por formi kunmetitan vorton, konsilindas uzi la radikojn de la bezonataj vortoj. Poste, oni povas aldoni al la kunmetita vorto finaĵon aŭ de verbo, aŭ de substantivo, aŭ de adjektivo, aŭ de adverbo, laŭ tio, kion oni intencas esprimi.
Ekzemple: Kapdolor-o; vaporŝip-a; maŝinskrib-i; testudpaŝ-e.

Kiam la radiko de la flankelemento estas verba, oni povas aldoni "**o**" al ĝi en la kunmetaĵo, se la tuto estas substantivo. Plie, por facila prononcado, oni povas konservi la finaĵon "**o**" de substantivo flankelementa.
Ekzemple: Dormoĉambro estas ĉambro, kie oni dormas.
Banotuko estas tuko, kiun oni uzas post bano.
Litotuko, fingroringo, fiŝoŝipo estas pli facile prononceblaj ol littuko, fingrringo, fiŝŝipo.

NE EKDORMU: Ĉu vi povis rimarki, ke en la kunmetaĵo, la unua radiko estas la flankelemento, kaj la dua, la ĉefelemento?

a) Nun formu kunmetaĵojn el la jenaĵoj: tuko de tablo; pepo de birdo; maŝino por kalkuli; ĉambro, kie oni ludas.

b) Ĉu vi scias, ke pripensi = pensi pri
ĉirkaŭiri = iri ĉirkaŭ ?

Trovu aliajn tiajn kunmetaĵojn, kaj klarigu ilin, konstruante frazojn.

2. Rilativaj vortoj aŭ rilativoj

a) La plej uzata estas **KIU**

Ekzemple: La homo, kiu manĝas (1). La homo, kiun vi vidas (2). La libroj, kiujn vi aĉetis (3). La libroj, kiuj falis (4).

En tiuj kvar frazoj, homo kaj libroj ne alprenis la akuzativan signon. Kvankam en la frazoj (2) kaj (3) la rilativoj alprenis tiun signon, oni ne aŭtomate metu "**n**" je la fino de la vortoj, al kiuj ili rilatas, ĉar tiuj frazoj ne montras la funkciojn de "libroj" kaj "homo".

KOMPARU NUN:

Mi vidas la homon, kiu manĝas.
Mi prenas la panon, kiun vi tranĉis.
Li aĉetis la librojn, kiujn oni rekomendis.
La instruisto sidas apud la lernantoj, kiuj kantas.
Sur la arboj estas birdoj, kiujn mi neniam antaŭe vidis.

**EKZERCO:** Kompletigu, se necesas.

a) La libroj...., kiu..... vi aĉetis, estas belaj.
b) Mi manĝis la pano...., kiu.... kuŝis sur la tablo.
c) Min amuzis la rakonto....., kiuj.... vi verkis.
ĉ) Ĉu la lernantoj....., kiuj sidas, vi jam vidis?
d) La lecionoj.... ŝatas la lernantoj...., kiuj tre atentas.

Rim.2: La rilativo kaj la vorto, al kiu ĝi rilatas, havas ĉiam la saman nombron: se la vorto estas en pluralo, ankaŭ la rilativo devas esti en pluralo, kaj, se la vorto estas singulara, ankaŭ la rilativo devas esti singulara.
Ekzemple: La libro, kiu ... La libroj, kiuj .....

b) Uzo de **KIA**

Pripensu: Li legis la libron, kiun ŝi legis. (1)
Li legis libron kian ŝi legis. (2)

Kiom da libroj ili legis en ĉiu el la ĉi-supraj frazoj?
En la frazo (1) temis pri unu libro, dum en (2) estis du libroj.
En (1) li kaj ŝi legis la saman libron.
En (2) li legis libron, kiu similas tiun legitan de ŝi.
DO: kiam oni uzas KIA, oni aludas kvaliton, samspececon.

**EKZERCO:** Klarigu, ĉu la jenaj frazoj estas logikaj.

a) Mi manĝos la panon, kiun vi manĝis.
b) Mi manĝos la panon, kian vi manĝis.
c) La lernantoj rigardas tabulon, kia estas en via domo.
ĉ) La birdoj kantas sur la arboj, kiujn mi flegas.
d) La birdoj kantas sur arboj, kiajn mi flegas.
e) Mi aĉetos la panon, kiun vi aĉetis.

c) Uzo de **KIO** kaj **KIOM**

Oni uzas la rilativojn **KIO** kaj **KIOM**, kiam la vortoj, al kiuj ili rilatas, estas **IO** (aŭ ĝiaj derivaĵoj) kaj **IOM** (aŭ ĝiaj derivaĵoj).

Ekzemple: Tio, kio estas sur la tablo, estas liniilo.
Mi ne ŝatas tion, kion vi diras.
Li manĝas tiom da pano, kiom vi.
Iom, kiom vi donis, ne sufiĉos por du homoj.

Rim.3: Oni povas forigi la vortojn TIO kaj TIOM en tiaj frazoj, kaj akordigi la vorton KIO laŭ ĝia funkcio en la frazo.

Ekzemple:
Mi ne ŝatas tion, kion vi faras = Mi ne ŝatas, kion vi faras.
Mi ne vidas tion, kio ĝenas vin = Mi ne vidas, kio ĝenas vin.
Lin mirigas tio, kion ŝi diras = Lin mirigas, kion ŝi diras.
Donu da pano tiom, kiom vi havas = Donu da pano, kiom vi havas.
Li montras tion, kio estas sur la tablo = Li montras, kio estas sur la tablo.

d) Uzo de **KIES**

Mi legas libron; ĝia kovrilo estas ruĝa = Mi legas libron, kies kovrilo estas ruĝa.

Mi renkontis viron; oni batis liajn filojn = Mi renkontis viron, kies filojn oni batis.
La lernantoj sidas kun la instruisto; la barbo de la instruisto estas blanka = La lernantoj sidas kun la instruisto, kies barbo estas blanka.

**EKZERCO:**

a) Uzu KIES en frazoj, kiujn vi konstruos.
b) Transformu tiujn frazojn en du aliajn, kiel en la ĉi-supraj ekzemploj.

c) Uzo de **KIE**

KIE signifas "en kiu", "en kiu loko".
Ekzemple: Mi sidas en la ĉambro, kie vi estis.
Mi iros tien, kie vi kuŝis.
Ĉu vi venos kun mi en la ĉambron, kien iris niaj samideanoj?

3. Ĉu vi scias, ke:

a) **Aŭskulti** kaj **aŭdi** ne havas la saman signifon?
b) **Rigardi** kaj **vidi** ne estas samsencaj?
Bonvolu esplori pri la diferencoj.

-=-=-=-=-=-

Ŝarado: Mi estas baza numeralo. Ĉu vi scias mian nomon? Certe ne! Mi helpu al vi: interŝanĝu lokojn de la konsonantoj de la kvarlitera nomo de planedo, kaj vi trovos mian nomon.

==:::::::::==

*"Ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru."*

*"Unu fava ŝafo infektas tutan ŝafaron."*

# SEPA LECIONO

1. Komparativoj

- KOFI kaj KOĜO estas dek-kvin-jaraj, kaj JAO, dudek-jara. JAO estas pli aĝa ol KOFI. KOĜO estas malpli aĝa ol JAO. KOFI estas tiel (aŭ: tiom) aĝa, kiel (aŭ: kiom) KOĜO.
- KOĜO havas dek bananojn, ankaŭ KOFI, sed mi, kvin: KOĜO havas pli da bananoj ol mi. Mi havas malpli da bananoj ol KOFI. KOĜO havas tiom da bananoj, kiom KOFI.

a) Komparativo de supereco
Ĝi estas signita per "**pli... ol**".
Ekzemple: KOFI estas pli aĝa ol mi.
KOĜO havas pli da bananoj ol mi.

b) Komparativo de malsupereco
Ĝi estas signita per "**malpli.... ol**"
Ekzemple: Mi estas malpli aĝa ol KOFI.
Li havas malpli da pano ol mi.

c) Egaleca komparativo
Ĝin signas "**tiel... kiel**". Oni uzas ankaŭ "**tiom.... kiom**", kiam la komparacio rilatas al mezuro.
Ekzemple: KOFI estas tiel aĝa kiel KOĜO.
KOĜO estas tiom aĝa kiom KOFI.
KOFI havas tiom da bananoj kiom KOĜO.

KOMPARU: Mi manĝas tiel, kiel vi (1).
Mi manĝas tiom, kiom vi (2).
En (1) temas pri maniero de manĝado, dum en (2), pri kvanto de manĝaĵo.

Rim.1:

a) Oni povas forlasi "tiel" kaj "tiom".

Ekzemple: Mi manĝas tiel, kiel vi = Mi manĝas kiel vi.
Mi manĝas tiom, kiom vi = Mi manĝas kiom vi.

b) Ne forgesu la akuzativon.

KOMPARU: Mi amas vin pli ol li (1).
Mi amas vin pli ol lin (2).
(1) signifas: "Mi amas vin pli ol li amas vin."
(2) signifas: "Mi amas vin pli ol lin amas mi."

**EKZERCO:** Klarigu la diferencon inter la frazoj de ĉiu frazparo:

a) Mi konsideras lin kiel amikon.
Mi konsideras lin kiel amiko.
b) Li batis KOĜOn pli ol min. Li batis KOĜOn pli ol mi.
c) Mi amas ŝin kiel mia edzino.
Mi amas ŝin kiel mian edzinon.
ĉ) La patrino lavas miajn fratojn malpli bone ol mi.
La patrino lavas miajn fratojn malpli bone ol min.

Rim.2: Anstataŭ "**tiel... kiel**" oni povas uzi "**same... kiel**", "**samgrade... kiel**".
Ekzemple: Mi amas lin sam(grad)e kiel vi.
Mi amas lin sam(grad)e kiel vin.

Rim.3: NEDIFINITA KOMPARACIO.
Ĝin signas "**malsama** (aŭ: **alia**) **... ol**"
Ekzemple: Mia aĝo estas malsama (aŭ: alia) ol la via.
En tiu ekzemplo nenio estas preciza: ĉu mi estas pli aĝa ol vi? ĉu malpli aĝa?
Mia respondo estas tute alia ol la via.
Mi pensas alie ol vi.
Mi manĝas malsame ol vi.

ATENTU: Oni ĉiam uzas "malsama... **ol**", sed "sama... **kiel**".
Ekzemple: Mia respondo estas malsama ol la via.
Mia respondo estas sama kiel la via.

## 2. Uzo de "ANTAŬ" kaj "ANTAŬ OL"

KOĜO lernas antaŭ MESA (1). KOĜO lernas antaŭ ol MESA (2)
En la frazo (1) oni devas kompreni, ke KOĜO estas antaŭ MESA kaj lernas.

Ĉu ankaŭ MESA lernas? Tion oni ne scias.
En la frazo (2) ambaŭ personoj lernas: unue KOĜO, kaj poste MESA.

**EKZERCO:** Laŭ la ĉi-supraj ekzemploj klarigu jenajn frazojn.

a) Mi trinkas kafon antaŭ mia frato.
b) La lernantoj ridas antaŭ ol la instruisto.
c) La lernantoj ridas antaŭ la instruisto.
ĉ) Mi vidas panon antaŭ kuko.
d) Mi vidas panon antaŭ ol kukon.

Rim.4: Laŭ tiu modelo oni povas uzi **POST, POST OL.**
Ekzemple: Mi manĝas post ol vi.
Vi manĝos panon post ol kukon.
Mi vidas lernanton post la tablo.
FAKTE, **POST OL**, kiel subjunkcio, estas preskaŭ ne-uzata. Ĝin oni anstataŭigas per **POST KIAM**, se sekvas predikato.
Ekzemple: Mi kuros post ol vi = Mi kuros post kiam vi kuros.
Li trinkis kafon post ol bieron = Li trinkis kafon, post kiam li bieron trinkis.

3. Ĉu vi memoras la uzon de "**IG**", "**IĜ**"?

- Ĉu tiu, kiu havas feliĉigan amuleton povas, laŭ vi, esti feliĉa? Pravigu la respondon.

- AMUZU metas blankan farbon sur la tutan surfacon de la fenestro: li igas la fenestron blanka; li blankigas la fenestron; pro tio la fenestro iĝas blanka; do, la fenestro blankiĝas.

Blankigi = igi blanka. Blankiĝi = iĝi blanka.

**EKZERCO.** Klarigu:

a) Feliĉiga amuleto.
b) La haroj nigriĝas.
c) La ĝojiga informo.
ĉ) Vi ne kontentigas min.

Rim.5: **IĜI** kaj **IGI SIN**

- Mi metas blankan farbon sur mian tutan korpon
= Mi blankigas min: mia korpo blankiĝas.
Per mia propra volo mi igas min blanka, dum la korpo ne havas ian deziron por tio.

KOMPARU: Mi lavas min (1). Mi laviĝas (2).

La frazo (1) signifas, ke mi mem iras en banejon kaj lavas mian korpon. (2) signas, ke ia situacio igas min tia; ekzemple, pluvo aŭ iu verŝas kvanton da akvo sur mian korpon.

**EKZERCO**

Ĉu la jenaj frazoj estas logike bonaj? Klarigu.

a) La haroj de maljunuloj blankigas sin.
b) Homoj maljuniĝas.
c) KOĜO maljunigas sin.
ĉ) La folioj de la arboj flaviĝas.
d) la folioj de la arboj flavigas sin.
e) La siteloj pleniĝas je akvo.
f) Mi malsanigas min.
g) La laguno plenigas sin per fiŝoj.

-=-=-=-=-=-

DIVENAĴO

Ĝi estas pli alta, sidante, ol starante. Kio ĝi estas?
Sciigo: Temas pri doma besto.

Serĉu nun la nomon de la besto.

==::::::::==

*"Kapo pekas, piedoj suferas."*

*"Ŝafaro harmonia lupon ne timas."*

# OKA LECIONO

1. La akuzativo (daŭrigo)

Ĉiuj scias, ke la akuzativo estas signita per "**n**".
Ekzemple: Mi jam manĝis panon. Vi vidis lin.
La rekta objekto ĉiam alprenas "**n**" akuzativan.

Sed notindas, ke la akuzativo estas uzata ankaŭ en aliaj kazoj.

a) Almovo

Kiam "io" aŭ "iu" movas sin aŭ moviĝas de iu loko en alian, tiam la atingata loko alprenas la finaĵon "**n**" akuzativan.

Ekzemple: Mi iras en la ĉambron. Mi metas la kreton sur la tablon. Muso kuras sub la liton.

Rim.1: Se ne okazas ŝanĝo de loko, oni ne uzas la akuzativon. Ekzemple: Mi iras en la ĉambro (Mi estas en la ĉambro, kaj iras en ĝi).
La muso kuras sub la lito. (La muso estas sub la lito, kaj kuras sub ĝi).
La insektoj flugas en la domo. (La insektoj estas en la domo, kaj en ĝi flugas).

**EKZERCO.** Komparu kaj klarigu:

1. La kato saltas sur la tablon.
   La kato saltas sur la tablo.
2. Mi veturis en nian landon.
   Mi veturis en nia lando.

Rim.2: Post la prepozicioj **AL** kaj **ĜIS**, la akuzativo ne estas uzata, ĉar tiuj ĉi prepozicioj havas en si mem la almovan sencon.
Ekzemple: Mi iras al la lernejo. Mi iras ĝis la lernejo.

NOTU, KE:

- Ekzistas diferenco inter **AL** kaj **ĜIS**.
  Mi iras al la lernejo (1). Mi iras ĝis la lernejo. (2)
  En la frazo (1) montriĝas, ke mi iras direkte al la lernejo, kaj volas/povas/intencas ĝin atingi, dum (2) montras, ke mi certe atingos la lernejon.
- Ekzistas diferenco inter **ĜIS** kaj **EN**.
  Ekzemple: Mi iras ĝis la lernejo (1). Mi iras en la lernejon (2)
  ĜIS montras en (1), ke mi devas atingi la lernejon, kaj sekve intencas (volas, povas) iri en ĝin, dum EN indikas, ke mi certe iros en ĝin.

b) Statŝanĝiĝo

Kiam io ŝanĝiĝas, la rezulto atingita alprenas la akuzativan "**n**".
Ekzemple: Mi rompas la ŝtonojn en erojn. Mi dividas la panon en du partojn. La magiisto transformiĝas en lignon.

**EKZERCO.** Komparu kaj klarigu:

a) Glaciaĵo transformiĝas en akvon.
   Glaciaĵo transformiĝas al akvo.
b) Mi dividas la kreton al du partoj.
   Mi dividas la kreton en du partojn.

c) Anstataŭigo de prepozicio (al, dum, je, en)

Oni povas forigi prepozicion kaj meti la akuzativan finaĵon al la vorto, al kiu ĝi rilatas.
Ekzemple: Mi iras al Parizo = Mi iras Parizon.
Mi estas aĝa je 20 jaroj = Mi estas 20 jarojn aĝa.
Mi kuras dum du horoj = Mi kuras du horojn.
Li estas alta je du metroj = Li estas 2 metrojn alta.
En la mateno li kuras = La matenon li kuras.

RIGARDU NUN:

La lernantoj eliras el la ĉambro. La stultulo devenas de tiu vilaĝo. Oni rimarkas, ke **EL** kaj **DE** estas uzataj kaj prefikse kaj prepozicie. En tiu ĉi kazo oni ne apliku la saman regulon, kiel por AL.

## EKZERCO

1) Kompletigu, se eblas, la jenajn frazojn.
   a) Mi metu la kreto..., en botelo... kie... vi ŝovis la pilketo...
   b) La banano falis sur la tablo..., kie... kuŝas miaj... libroj...
   c) Mi iris en Parizo... antaŭ ol en Liono...
   ĉ) La birdoj flugis de sur la arbo... al nia... domo... kaj en la domo... de TOTO.
   d) La ŝtelisto kuris ĝis arbaro..., iris en ĝi..., kaj tie sin kaŝis.
   e) La lernantoj kasis sin en la ĉambro..., kie... ili kuris.
   f) Mi estas ĉi tie..., kaj iros tie..., kie... vi estis hieraŭ.
   g) La turo estas je 40 metroj... alta.
   ĝ) En ĉiu... mateno... mi... manĝas pano...
   h) La lignaĵoj ŝanĝiĝis en cindro..., kaj poste al kotaĵo...
   ĥ) Li ĉiu... tago... kuras sur la plaĝo...
   i) Li preĝis dum tri horoj..., nenio... trinkante.
   j) Tri semajnoj... plenaj... okazos la Esperanta... kurso...

2) Anstataŭigu, se eblas, la prepozicion per la akuzativo.
   a) La lernanto estas peza je 40 kilogramoj.
   b) En (aŭ: dum) oktobro mi malvarmumas.
   c) Li babilis dum tri horoj.
   ĉ) La libron mi prenis el la sako nigra.
   d) Li elvenis el la garaĝo.
   e) Li venis de la garaĝo.
   f) La pilgrimantoj iros ĝis nia lernejo, kaj de tie al la preĝejo.

3) Rekonstruu la sekvajn frazojn, uzante prepozicion.
   a) Mi instruas al vi tri plenajn horojn.
   b) Ĉiun jaron mi lernu ion plian.
   c) La leciono daŭros dek minutojn.
   ĉ) La sako estas 20 kilogramojn peza.
   d) Mi iras mian vilaĝon, kaj renkontos amikojn malproksimajn.
   e) La proksiman jaron mi partoprenos en la universala kongreso.

2. ĈU VI KOMPRENAS, KE:

"Mi preĝas ĉiun trian horon" signifas, ke la daŭro inter du sinsekvaj preĝoj estas tri horoj?
JES, ĉar vi preĝas je la unua, poste je la 4-a, 7-a, 10-a, 13-a, ktp.

**EKZERCO**

a) Klarigu: Mi festas ĉiun trian monaton.
Tiaj aferoj okazas ĉiun dekan jaron.
Kristnasko-festo estas celebrata ĉiun dek-duan monaton.

b) Uzu tiun formon por diri, ke:
Vi iras en lernejon en lundo, merkredo kaj vendredo, en ĉiu semajno.
Viaj amikoj vizitadas preĝejon, ĉiujare, dum aprilo, aŭgusto kaj decembro.

-=-=-=-=-=-

Anekdoto:

Oni ofte diras: "Kun kiu vi festas, tia vi estas." Rigardu ABOLOn. Li ĉiam vizitadas la putinon, kiu loĝas en la domo apud la universitato. Li kuŝas tie, tie manĝas, tie ĉion ajn faras. Do, li festas kun putino. Tiaokaze, kio li estas?
- Li estas vera PUTO.

==******==

*"Ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas."*

*"Unueco donas fortecon."*

# NAŬA LECIONO

1. Konjugacio (daŭrigo)

a) La volitivo

La volitivon oni uzas por ion ordoni, peti, voli, deziri, ktp. Ĝi estas la u-modo, pri kiu ni jam parolis.
Ekzemple: Mi deziras, ke vi kantu
Kuru! Iru al viaj gepatroj!

Rim.1: Kelkaj verboj postulas, ke la u-formo estu uzata, kiam ilin sekvas la konjunkcio "KE". La plej oftaj estas: voli, postuli, ordoni, ŝati, peti, deziri, necesi (esti necese), nepri (esti nepre), ktp.
Ekzemple: Mi deziras, ke vi sukcesu.
Necesas (estas necese), ke vi iru supren.

b) La kondicionalo

En la kondicionalo la verbo havas la finaĵon "**us**". Tiu modo esprimas kondiĉon, teorian eblon, supozon, eventualecon, ktp.
Ekzemple: Mi manĝus, se mi havus monon.
Se mi scius la utilon de Esperanto, mi jam delonge ĝin lernus.

NOTU, KE la du verboj de ĉiu el la du frazoj de la lasta ekzemplo estas en us-formo. Tio ne estas hazardo, sed DEVIGA en Esperanto. Kiam oni esprimas agon kondiĉitan de alia, ĉiam ambaŭ agoj esprimiĝas per us-formo.
Ekzemple: Mi kant**us**, se mi hav**us** taŭgan voĉon.

2. Superlativo

La superlativon oni uzas por indiki, ke iu aŭ io havas apartan kvaliton el inter ĉiuj aliaj samspecaj. Tiun superlativon oni esprimas per "**la plej... el**", kiam temas pri iu(j) el inter

multaj, kaj per "**la pli... el**", kiam temas pri unu el inter du.
Ekzemple: La polekso estas **la plej** dika **el** la fingroj.
La dekstra mano estas ĝenerale **la pli** lerta **el** la du manoj.

**EKZERCO**

1. Kompletigu
   a) El viaj okuloj la dekstra estas la ..... sana.
   b) AFI estas la ..... inteligenta el la edzoparo.
   c) Esperanto estas la ..... facila el ĉiuj lingvoj.
   ĉ) El inter kuko kaj bulko, kuko estas la ..... ŝatata de mi.
   d) En nia Esperanto-rondo, ĈOĈOVI estas la ..... ruza el la lernantoj.

2. a) En mia libraro la matematika libro estas la pli verda. Kiom da verdaj libroj mi havas?
   b) Li manĝas kun sia pli bona amiko. Kiom da amikoj li havas?
   c) ADEFOĜI amuzas sin kun la plej atenta lernanto. Kion vi scias pri la nombro de la atentaj lernantoj?

Rim.2: Memoru la uzon de "**kiel eble plej**"
Ekzemple: Venu kiel eble plej rapide.
Donu al mi kiel eble plej multe da pano.
KOFI estas kiel eble plej ruza.
La kiel eble plej atenta lernanto nun ripozas.

**EKZERCO:** Traduku la frazojn de la ĉi-supra ekzemplo en vian nacian aŭ laboran lingvon.

3. MEMORU, KE:

a) **aĵo:** ĝi signifas viandon, kiam ĝin oni uzas sufikse kun bestonomo. Ekzemple: Porkaĵo estas viando de porko.
Bovaĵo estas viando de bovo.

b) **da ĝi; da ili**
"**da ĝi**" signifas "peco de ĝi", dum "**da ili**" signifas "kelkaj el ili".
Ekzemple: Donu al mi panon; nur da ĝi.
Ĉu vi havas bananojn? Manĝu da ili.

c) **ĉu; se, tiel, tiom**

- **ĉu**-respondo estas "JES" aŭ "NE".

Ekzemple: Ĉu vi lernas Esperanton? JES!
Ĉu la angla estas pli facila ol Esperanto? NE!
Ĉu KOFI lernos Esperanton? Mi ne scias, ĉu li lernos ĝin.
Ĉu li lernis la anglan? Mi dubas, ĉu li lernis ĝin.

- **se** esprimas kondiĉon.

Ekzemple: Se mi havus monon, mi konstruigus kastelon.

- **tiel** montras manieron kaj gradon, dum **tiom**, mezuron.

Ekzemple: La amfiteatro estas tiom granda, ke ĝi povas enhavi pli ol kvincent homojn.
La domo estas tiel bela, ke ĉiu preterpasanto haltas almenaŭ dek minutojn por ĝin admiri.

ĉ) **ujo da ; ujo de**

**"ujo da io"** estas io, dum **"ujo de io"** estas ujo.

Ekzemple: Glaso da vino = (ne)plena je vino.
Glaso de vino = Glaso destinata por vino.

d) **ĉiuj**

Ĉiuj lernantoj estas afablaj.
Ĉiuj homoj estas fratoj unuj de la aliaj.
Tasko: Traduku tiujn frazojn en vian lingvon nacian aŭ laboran.

Rim.3: - Post "ĉiuj" oni neniam uzas la artikolon "**la**".
- La singularo "ĉiu" indikas la individuojn aparte.
Ekzemple: Ni foriris, ĉiu al sia laboro.
- Kelkafoje "ĉiuj" kaj "ĉiu" samsignifas.
Ekzemple: Ĉiu homo mortos = ĉiuj homoj mortos.

e) **multaj - multe da ; kelkaj - kelke da**

"**multaj**" kaj "**kelkaj**" indikas, ke la konsiderataj aferoj estas diversaj, dum "**multe da**" kaj "**kelke da**" rilatas al kvanto aŭ mezuro de unusola sama speco.

Ekzemple: Multaj panoj = divers(spec)aj panoj.
Multe da pano = granda kvanto da pano.

Kelkaj monoj = divers(spec)aj (ne-multaj) monoj
(ekzemple: guldeno, marko, dolaro)
Kelke da mono = iom da mono (ekzemple: guldeno)
DO; kompreneblas, ke kelkiam, nur "multaj" (aŭ kelkaj), aŭ nur "multe da" (aŭ kelke da) estas uzenda.

Ekzemple: Estas multaj lernantoj en la klaso.
Estas malmulte da polvo en la banejo.
Kelke da fiŝoj mi manĝis.
Kelkaj amikoj venis.
Kelke da suko mi trinkis.

Rim.4: Anstataŭ "**kelke da**" oni devas uzi "**iom da**", kiam la vorto, al kiu ĝi rilatas, estas en la singularo.

Ekzemple: Kelke da fiŝo = iom da fiŝo.

f) **ne plu - jam ne**

"**ne plu**" indikas, ke oni ne daŭrigas la agon jam komencitan, dum "**jam ne**" montras, ke oni ne faros la agon jam intencitan.

Ekzemple: Mi ne manĝas plu : mi jam ion manĝis.
Mi jam ne manĝas: mi intencis manĝi, sed fine rezignas (pro iu ajn kaŭzo aŭ volo).

g) **ne jam - ankoraŭ ne**

Ili montras, ke la ago tute ne okazas jam.

Ekzemple: Mi ne jam manĝas = mi daŭre (plu) ne manĝas
(eble mi manĝos)
Mi ankoraŭ ne manĝas = „ „ „ „

NOTU, KE: "**ne ankoraŭ**" estas uzata por paroli pri la neripetado aŭ la ne-daŭro de la ago.

Ekzemple: Mi ne ankoraŭ manĝos : mi jam manĝis kaj ne plu manĝos pliajn fojojn.

ĝ) **devi - rajti**

Mi devas iri en lernejon. **devi** montras, ke mi neniel povas rifuzi iri en lernejon. Mi kulpos, kiam mi rifuzos.

Mi rajtas iri en lernejon. **rajti** montras, ke neniu povas malhelpi min iri en lernejon. Mi mem povas rifuzi tion. Kiu malhelpos min iri en lernejon, tiu ege kulpos.

-=-=-=-=-=-

Poemeto **Mi ĉiam bezonas cin**

Jen tra herbejoj,
Kamparoj kaj montaroj,
Arbaroj kaj riveraroj,
Mi iras renkonte al ci.
Kie mi povas trovi cin?
Mi iras rekte, sed cin mi ne trovas.
Mi iras dekstren kaj maldekstren,
Returnen kaj alten, ĉiam senespera vagado.
Ĉu ci ne povas aperi al mi?
Ĉu ci timas min nun?
Kial ci povas tiom kaŝi cin de mi?
Ĉu ci ne ekzistas plu?
Mi bezonas cian ĉeeston.
Neniu povas eĉ cin surogati al mi.
Revenu! Revenu! Cia posteno ĉiam vakas.
Miaj brakoj al ci restas etenditaj.

==******==

*"Se la arbo falis, ĉiun branĉon derompas."*

*"Sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas."*

# DEKA LECIONO

1. Bazaj numeraloj

a) Literumado de la numeraloj bazaj

0 (nul); 1 (unu); 2 (du); 3 (tri); 4 (kvar); 5 (kvin); 6 (ses); 7 (sep); 8 (ok); 9 (naŭ); 10 (dek); 11 (dek unu); 12 (dek du); 19 (dek naŭ); 20 (dudek); 21 (dudek unu); 29 (dudek naŭ); 90 (naŭdek); 99 (naŭdek naŭ); 100 (cent); 101 (cent unu); 125 (cent dudek kvin); 500 (kvincent); 999 (naŭcent naŭdek naŭ); 1 000 (mil); 1 004 (mil kvar); 2 000 (du mil); 10 400 (dek mil kvarcent); 1 000 000 [(unu) miliono)]; 1 000 000 000 [(unu) miliardo].

Rim.1: Notu la literumadon de
12 : dek du ; 20 : dudek.
12 = 10 kaj 2 do 12 = dek du.
20 = duoble dek do 20 = dudek
La literumado de 12 estas en du vortoj, dum tiu de 20, en unu vorto.
300 = trioble cent do 300 = tricent
SED: 3 000 = tri mil · 9 000 = naŭ mil.
Oni devas rimarki, ke kun mil la literumado estas en du vortoj.
Ekzemple: 2 004 = du mil kvar
3 989 = tri mil naŭcent okdek naŭ

**EKZERCO**

1. Literumu la jenajn (bazajn) numeralojn:
375 ; 105 ; 4 500 ; 1 250 699 ; 4 567 876 932.

2. Ciferumu:
Unu miliardo kvar milionoj kvincent mil kvarcent okdek naŭ
Dudek du mil kvincent tridek ok
Sep milionoj okcent du
Sep mil dudek sep.

b) Substantivigo, adverbigo, adjektivigo de (baza) numeralo

Aldonante "**o**", "**a**", aŭ "**e**" ĉe la fino de ĉiu baza numeralo, oni formas respektive substantivon, adjektivon aŭ adverbon.

Ekzemple: Per "unu" formiĝas "unuo", "unua", "unue".
Kvaro da lernantoj = kvar lernantoj.
Cento da viroj = proksimume cent viroj.
Miloj da bulkoj = pli ol mil (ĝis infinito)...
La tria lernanto post mi, estas la filo de la inspektoro.
Li unue staris, due ridis, trie saltetis kaj kvare kuregis.

Rim.2: Kiam oni substantivigas, adjektivigas aŭ adverbigas, oni devas anstataŭigi la (subkomprenitan) konjunkcion "**kaj**" en la literumado de la numeralo, per streketo.

Ekzemple: Pri dek du, ni scias, ke ĝi estas "dek kaj du".
Do, dek-duo, dek-due, dek-dua.
2 353-a : du mil-tricent-kvindek-tria.

2. Uzo de la numeralo orda

La adjektivigo de baza numeralo formas ordan numeralon.
Ekzemple: dua ; dek-dua ; dudek-kvina, ktp. estas ordaj numeraloj.

a) Por rangigi aŭ vicigi
La unua lernanto, la dua, la tria, ktp.

b) Indiko de horo, dato, ktp.
- Estas la unua horo, la kvara horo, la deka horo, la dudek-tria horo, ktp.
- La dudeka tago de julio.
- La 1990-a jaro de la Kristana erao.
- La 20-a jarcento.

Rim.3: Oni ofte forlasas la vortojn "horo", "tago", "jaro", kaj en la lasta (ĉe "jaro"), eĉ metas bazan numeralon.

Ekzemple: Je la dua horo = je la dua.
La 1990-a jaro = la jaro 1990.

c) Indiko de paĝoj de libro
La tria paĝo, la cent-tridek-dua paĝo, ktp.

Rim.4: Oni povas uzi nur la bazan numeralon por indiki paĝojn. Ekzemple: La tria paĝo = la paĝo 3 (paĝo 3)

Rim.5: Por fari demandojn, kies respondoj rilatas al orda numeralo, oni uzas la demandan vorton "**KIOMA**"

Ekzemple: Kioma horo estas? Ĝis kioma paĝo vi legis la libron?
Kioma tago estas hodiaŭ? Kioma monato estas marto (en la jaro)?
Kioma jaro (de la kristana erao) estas la nuna?

Notu, ke oni povas uzi ankaŭ la demandajn vortojn **KIA** kaj **KIU**: Ekzemple: Kian daton ni havas hodiaŭ?
Kiun (aŭ kian) paĝon de la libro vi jam tralegis?
Kian tagon vi venos? Kia horo estas?
Kiu dato estos morgaŭ?

Tamen, preferindas uzi "kiu" kaj/aŭ "kioma", farante tiajn demandojn.

**EKZERCO.** Respondu la demandojn de la ekzemploj sub Rim.3

SCIU, KE: Kiam oni diras "paĝo tri", "la jaro 1990, aŭ simple, 1990", oni nur nomas la paĝojn, jarojn, ktp.
Ekzemple: Sur la paĝo tri de via libro estas makulego. La trian de julio 1990, mi iris en la urbon Lome.

**EKZERCO:** Kompletigu, se eblas, per metado de datoj, kaj eventuale per akuzativigo.

a) Morgaŭ estos la .... de .... (skribu la kompletan daton)
b) La ............ estas la Kristonaskotago.
c) Kiam vi naskiĝis? Mi naskiĝis ...............
ĉ) Morgaŭ, la .............. mi iros al ZALIVE.
d) Julio estas la ..... monato.... de la jaro ......
e) Post tri tagoj ni atingos la ...... tag.... de .........

## 3. IOM DA MATEMATIKO

a) Specoj de numeraloj (nombroj)

1. Entjeroj: 0, 1, 2, 3, ..., 10, 11, ... 20, ... ĝis infinito.
La paraj entjeroj estas: 0, 2, 4, ... 18, ... 100, ktp.
La neparaj estas: 1, 3, 5, 7, ... 23, ... 135, ...ktp.
La primaj entjeroj aŭ primoj estas: 2, 3, 5, 7, 11, 13, 17, 19, 23, 29, 31, 37, 41,...
vidu: b-4 ĉi-sube, "divido".

2. Decimalaj nombroj aŭ decimaloj
15,4 : dek kvin komo kvar.
238,59 : ducent tridek ok komo kvindek naŭ. Ktp.

3. Negativaj kaj pozitivaj nombroj
(-3) : minus tri ; (-4,6) : minus kvar komo ses ;
(+0,7) : plus nul komo sep ; (+13) : plus dek tri; ktp.
La minus-nombroj estas negativaj, kaj la plus-nombroj estas pozitivaj.

b) Kalkulo

1. Adicio
Kvar kaj (aŭ plus) kvin estas (aŭ egalas, aŭ faras) naŭ:
4 + 5 = 9
9 estas la sumo de la adiciatoj 4 kaj 5.

2. Subtraho
Dek minus du (aŭ du el dek) estas ok : 10 - 2 = 8
8 estas la diferenco inter la subtrahato 2 kaj la malpliigato 10.

3. Multipliko
Sepoble kvin estas tridek kvin; aŭ: Kvin obligite (aŭ multiplikite) per sep estas tridek kvin. 7 x 5 = 35
35 estas la produto de la faktoroj 7 kaj 5.

4. Divido
36 dividite per 9 estas 4 : 36 : 9 = 4
4 estas la kvociento de la dividato 36 per la dividanto 9.

Notu, ke la dividanto estas divizoro de la dividato (aŭ divizoras la dividaton), kiam la kvociento estas entjero, kaj la resto de la divido estas nul.
Ekzemple: 36 ÷ 4 = 9 signifas, ke 36 estas divizorebla per 4, aŭ 4 estas divizoro de 36, ĉar la resto de la divido "36 : 4" estas nul (0).
37 ÷ 4 = 9 kun resto egalanta 1 ; tiu ne-nula resto montras, ke 4 ne estas divizoro de 37, aŭ 37 ne estas divizorebla per 4.

Ĉiu entjero povas havi unu aŭ plurajn divizorojn.
"Da" estas aro de la divizoroj de la entjero "a".

Do, $D_4$ estas la aro de la divizoroj de 4, kiuj estas 1, 2 kaj 4.
$D_{36}$ estas la aro de la divizoroj de 36, kiuj estas 1, 2, 3, 4, 6, 9, 12, 18 kaj 36.
$D_2$ estas la aro de la divizoroj de 2, kiuj estas 1 kaj 2.
$D_{17}$ estas la aro de la divizoroj de 17, kiuj estas 1 kaj 17.

Nun, ĉiu entjero, kiu havas nur du divizorojn, estas nomata PRIMO aŭ PRIMA ENTJERO.

Ekzemple: 17, 2 kaj 3 estas primoj.

Do: Ĉiu entjero "**x**" (prononcu: ikso) estas primo, se ĝi estas la produto nur de la faktoroj "x" kaj 1 ; $x = x \times 1$
$17 = 17 \times 1$   $2 = 2 \times 1$   $3 = 3 \times 1$, ktp.

Frakcio

$36 : 4 = \frac{36}{4}$   $\frac{36}{4}$ estas frakcio.

$\frac{4}{3}$ estas frakcio, ankaŭ $\frac{1}{5}$ ; $\frac{57}{36}$ ktp.

$\frac{4}{3}$ estas "kvar super tri" : 4 estas la numeratoro aŭ nomanto, dum 3 estas la denominatoro.

Alia literumado de $\frac{4}{3}$ estas : "kvar trionoj", ĉar $\frac{4}{3} = 4 \times \frac{1}{3}$

aŭ: kvaroble triono (4-oble 3-ono)

12 : 4 estas 12-oble triono; aŭ: 12 trionoj.

$\frac{5}{6}$ estas kvin sesonoj aŭ kvin super ses, ktp.

5. Potencigo

La dua potenco de 4 estas 16 : $4^2 = 16$
2 estas la eksponento, 4 la potencato kaj 16 la potenco.
Ekzemple: La kvina potenco de 2 estas $2^5 = 2 \times 2 \times 2 \times 2 \times 2 = 32$
Notu, ke:
- miliono estas unu-iliono
- miliardo estas unu-iliardo.

Do, oni povas sufikse uzi la vortojn "**ilion-**" kaj "**iliard-**" kunmetitaj kun entjero por literumi grandajn numeralojn.

Ni vidu: 1 000 000 = $10^6$ = miliono aŭ unu-iliono.
miliono aŭ unu-iliono estas la unua potenco de iliono.
Tio montras, ke la dua potenco de miliono aŭ iliono estas

du-iliono $(10^6)^2$ = 1 000 000 000 000

Tri-iliardo estas $(10^9)^3$ = 1 000 000 000 000 000 ....000
entute 27 nuloj.

**EKZERCO**

1. Ciferumu tri-ilionon kaj kvar-iliardon.
2. Transskribu tri-ilionon en -iliardon, kaj kvar-iliardon en -ilionon.

6. Ekvacio

10 + x = 13 estas ekvacio, kies konatoj estas 10 kaj 13, dum x estas la nekonato. Oni povas kalkuli la valoron de la nekonato, t.e. solvi ekvacion.

Solvado de ekvacio $10 + x = 13$

$x = 13 - 10$

$x = 3$

3 estas la solvo de la ekvacio.

**EKZERCO**

Ĉu vi povas solvi la jenajn ekvaciojn, kies nekonatoj estas x ?

$x - 3 = 9$ ; $5 - x = 1$ ; $3x - 7 = 11$ ; $2x + 3 = 5x - 24$

7. Elradikigo

La dua radiko de 9 estas 3 : $\sqrt{9} = 3$

La dua radiko de 144 estas 12 : $\sqrt{144} = 12$

3 estas la dua radiko de 9, kaj 12, tiu de 144.

Cerbumu: Ĉu vi povas trovi la duan radikon de 16, la trian radikon de 64, kaj la kvinan radikon de 32 ?

Klarigo : La n-a (prononcu : no-a) radiko de $a^n$ estas a $\sqrt[n]{a^n} = a$

Kiam n = 2, oni skribas $\sqrt{a^n} = a$

Do: la 6-a radiko de 64 estas 2, ĉar 64 = 2x2x2x2x2x2 = 2

$\sqrt[6]{64} = \sqrt[6]{2^6} = 2$

**PROBLEMO:** La mono de JAO, en Togolandaj frankoj, estas la tria potenco de 20, aŭ la dua radiko de 64 000 000. Tiu mono ne sufiĉas al li por aĉeti fotilon. Tiam li diras: "Se Panjo donus al mi sep dudek-onojn de mia mono, mi povus aĉeti la fotilon kaj la filmrulon, kostantan 675 F (F signifas Togolandan frankon). Kiom kostas la fotilo?

4. Ĉu vi memoras la anstataŭigon de **DUM** per la akuzativo?

La samon oni povas fari pri **EN**, kaj anstataŭigi la akuzativon per "**e**" adverba, kiam **DUM** kaj **EN** rilatas en tempo.

Ekzemple: - En (dum) ĉiu mateno mi fastas.
aŭ: Ĉiun matenon mi fastas.
kaj nun: Ĉiumatene mi fastas.

- Dum (en) tiu tago mi malsanis.
aŭ: Tiun tagon mi malsanis.
kaj nun: Tiutage mi malsanis.

- Dum (en) vendredo mi ne manĝas viandon.
aŭ: Vendrede mi ne manĝas viandon.

- En (dum) ĉiu frua mateno mi ellitiĝas.
aŭ: Ĉiun fruan matenon mi ellitiĝas.
kaj nun: (Ĉiu)Frumatene mi ellitiĝas.

**EKZERCO:** Uzu "**ĉiu jaro**", "**la proksima dimanĉo**", "**kelkaj fojoj**", "**tiu somero**" kaj "**la lasta vintro**" por fari samtipajn frazojn.

-=-=-=-=-

Anekdoto: KOĜO metas siajn piedojn en fekaĵojn kaj tre ĝojas pro iliaj ega kvanto kaj fiodoro. Tiam lia amiko tre miras:

- He! KOĜO, kion vi faras tie en tiuj haladzaj fekaĵoj? Rapidu eksteren!
- Ho! vi, nulo. Morgaŭ mi gajnos egan monon per loterio, ĉar fekaĵoj precipe likvaj kaj malbonodoraj bonŝancigas, se oni metas sian piedojn en ilin.

==ЖЖЖЖ==

*"Kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas."*

*"Longa dormado ŝuldojn kreskigas."*

# DEK-UNUA LECIONO

1. Transitiveco de verbo

a) Difino

- Ĉiu verbo, kiu per si mem postulas komplementon, estas transitiva.
Ekzemple: ŝati : Mi ŝatas vinon ; vidi : Mi vidas vin.
- Ĉiu verbo, kiu ne kondutas kiel transitiva verbo, estas ne-transitiva.
Ekzemple: promeni ; dormi ; ripozi, ktp.
- Kelkaj verboj povas konduti, jen kiel netransitiva, jen kiel transitiva.
Ekzemple: informi ; ludi ; fumi ; instrui, ktp.
Mi ludas violonon. La buboj ludas. Li fumas cigaron.
La cigaro fumas.

b) Kiel rekoni transitivecon?

Ni jam konas multajn verbojn transitivajn kaj ne-transitivajn. Por pli da certeco oni devas konsulti vortaron (PV aŭ PIV).
- La transitivaj verboj estas signitaj per **(tr)**, kaj la ne-transitivaj per **(ntr)**.
- En PV la verboj, kiuj estas aŭ/kaj transitivaj aŭ/kaj ne-transitivaj, havas la signon **(x)**.

Aldonindas, ke ĉiuj ig-verboj estas transitivaj, kaj ĉiuj iĝ-verboj, ne-transitivaj.
Ekzemple: Min dormigas via parolado.
La lernantoj kolektiĝas.

c) Transitivigo de netransitivaj verboj

La aldono de la sufikso **IG** al la netransitivaj verboj igas ilin transitivaj.
Ekzemple: promenigi ; dormigi ; bruligi ; irigi, ktp.

Rim.1: Oni povas aldoni tiun sufikson ankaŭ al transitivaj verboj; tiam ili povas havi rektan kaj ne-rektan komplementon.
Ekzemple: Mi lernigas vin pri muziko. Mi lernigas al vi muzikon.

**EKZERCO**

a) Aldonu **IG** al ĉiu el la jenaj verboj kaj uzu la kunmetitajn vortojn en frazoj: stari, kaŝi, iri, ami, klaĉi, kompreni, influi, danki, diboĉi, deziri, saluti, kuŝi, ripozi, plori, angori.
b) Kiuj el la ĉi-supraj verboj estas transitivaj? Netransitivaj? Jen transitivaj, jen netransitivaj?

Rim.2: Oni povas uzi prefikse prepoziciojn por transitivigi.
Ekzemple: trairi straton ; travivi aventuron ; preterpasi ion ; transsalti flakon ; elparoli vorton.

ATENTU: La prepozicio **PRI** estas ĉiam pli kaj pli prefiksigita en komuna uzo.
Ekzemple: Priparoli aferon ; pripensi problemon ; prisilenti temon ; prikanti heroon ; priŝteli riĉulon.

**EKZERCO.** Klarigu la diferencon inter la frazoj de la sekvaj frazparoj:
- Ni prisemas nian kampon. Ni semas maizon.
- KOKU skribis leteron. KOKU priskribis sian deĵorejon.

d) Netransitivigo de transitivaj verboj

- Per aldono de la sufikso **-IĜ** al transitivaj verboj oni formas netransitivajn verbojn.
  Ekzemple: aŭdiĝi ; konsumiĝi ; vidiĝi, ktp.

Rim.3: Oni povas uzi **-IĜ** kun netransitivaj verboj. Tiam **-IĜ** atentigas pri ŝanĝo de stato, kaj signifas "komenci esti -anta aŭ inta (laŭ la kunteksto)".
Ekzemple: Mi erariĝas : mi antaŭe ne eraris, sed nur komencis erari.
Mi kuŝiĝas: mi havis alian pozicion, sed nun ekkuŝas.
OFTE, anstataŭ -IĜ ĉe la netransitivaj verboj, preferindas uzi la prefikson **EK**. Menciindas, ke **EK** montras la subitecon

de la ago, dum **IĜ**, la nesubitecon.

Ekzemple: Mi erariĝas = la ago okazas malrapide.
Mi ekeraras = la ago okazas subite.

Komparu: "Mi ekstaras" kaj "Mi stariĝas".

2. Nepersonaj verboj

Nepersona verbo estas verbo, kiu en sia ordinara senco neniam bezonas subjekton.

Ekzemple: pluvi, neĝi, hajli, rosi, ktp.

3. **SI** kaj **SIA**

a) "**si**" estas la pronomo tria-persona, kiu resendas al la subjekto de la propozicio.

Ekzemple: Li lavas sin.
JOHANO lavas sin (Johano lavas Johanon mem).
KOFI donas al si taskon (al KOFI mem).
La lernantoj respektas sin (ĉiu lernanto respektas sin mem).

Rim.4: **SI(N) RECIPROKE. Unu(j) la alia(j)n.**
"La lernantoj respektas sin" signifas, ke ĉiu lernanto respektas sin mem. Tiu "**si(n)**" sola ne montras, ke unu lernanto respektas la aliajn kaj reciproke.
Do, por montri la reciprokecon de la ago oni uzas "**si(n) reciproke**" aŭ "**unu(j) la alia(j)n**".

Ekzemple: La lernantoj amas sin reciproke.
La lernantoj amas unu la alian.

**EKZERCO**

a) Klarigu la diferencon inter ambaŭ frazoj de la frazparo.

1. La lernantoj lavas sin reciproke; la lernantoj lavas sin.
2. La homoj amas sin; la homoj amas sin reciproke.
3. La homoj laboras por si; la homoj laboras por si reciproke.
4. La malsaĝuloj donas al si frapojn; la malsaĝuloj donas frapojn unu al la alia.
5. La virinoj insultas unuj la aliajn; la virinoj insultas unu la alian.
6. La lernantoj batas unu la alian; lernantoj batas unuj la aliajn.

b) Konjugu la verbojn: sin lavi, doni al si, labori por si, kulpi pro siaj eraroj kaj sin senkulpigi, en la prezenco, futuro kaj preterito de la indikativo, kaj poste en la prezencoj volitiva kaj kondicionala.

b) **SIA**

Ĝi estas la adjektivo devenanta de **SI**. Do, ankaŭ ĝi resendas al la subjekto de la sama propozicio.

Ekzemple: La lernantoj amas sian instruiston. (Temas pri la propra instruisto de la lernantoj).

Komparu: KOFI manĝas sian bananon; KOFI manĝas lian bananon.
La lernantoj purigas sian lernejon; la lernantoj purigas ilian lernejon.

**EKZERCO.** Klarigu la diferencon inter la frazoj de ĉiu frazparo.

1. KOFI sidas kun KOĜO, kiu ne volas promeni kun sia amiko.
   KOFI sidas kun KOĜO, kiu ne volas promeni kun lia amiko.
2. La lernantoj iras al la instruisto, kaj salutas liajn amikojn.
   La lernantoj iras al la instruisto kaj salutas siajn amikojn.
3. JAO vizitis sian amikon, kiu kverelis kun lia amikino.
   JAO vizitis lian amikon, kiu kverelis kun sia amikino.
4. EKLU ŝatas lian laboron, sed li malŝatas la sian.
   EKLU ŝatas sian laboron, sed li malŝatas la lian.

4. Refleksiva verbo kaj responda iĝ-verbo

Ĉu "mi lavas min" kaj "mi laviĝas" havas saman signifon? Ni jam lernis, ke **IGI SIN** montras memvolon, dum **IĜI**, nememvolon. Do, en LAVI SIN oni vidas memvolon, dum en LAVIĜI, okazon.

Ekzemple: Mi lavas min antaŭ ol iri al la lernejo.
Kiam mi iras en la lernejon, tiam pluvas; mi laviĝas.

**EKZERCO**

a) Komparu: levi sin kaj leviĝi ; vekiĝi kaj veki sin ;
amuzi sin kaj amuziĝi ; ellitigi sin kaj ellitiĝi.

Konstruu frazojn klarajn kaj kompreneblajn per la ĉi-supraj verboj.

b) Ĉu iu povas: veki sin? mortigi sin? malami sin? regi sin? perfidi sin? denunci sin? bati sin? entombigi sin? instrui sin?
Per frazoj ĝustigu la respondojn.

-=-=-=-=-=-

Poemeto : **SILENTO**

Jam la tago estas for,
Ĉiuj homoj en familio babiletas,
La birdoj en nestoj dormas.
La stratoj estas senhomaj.
Pio! Pio! Noktaj bestoj ŝriketas.
Malproksima sono facile aŭdiĝas.
Kroa! Kroa! Ranoj en marĉoj kantas.
Tiam noktomeziĝas.
Aŭdiĝas roso falanta sur la tegmentojn,
Eĉ krio de formikoj vekas dormantojn,
La maldormantoj sentas sin maltrankvilaj,
Ĉar etaj iliaj spiroj forte resonas.
De malproksime aŭdiĝas konfuza eĥo:
"Help! Help! Mia kor' estas for".
Ĉies ripozo tiam estas ĝenata.
Ĉiuj releviĝas, dum ies dormo eterniĝas.

==*****==

*"Ludo aparte, kaj afero aparte."*

*"Kiu bone agas, timi ne bezonas."*

# DEK-DUA LECIONO

1. Participo

La finaĵoj participaj estas:

**ANT-AT**

Ili estas la finaĵo de la prezenco. Ili montras, ke oni konsideras agon ĝuste en la momento, kiam ĝi okazas.

Ekzemple: Mi manĝas panon. Mi estas manĝanta panon.
Pano estas manĝata de mi.

**ONT-OT**

Ili indikas la futuron kaj signas, ke la ago okazos.

Ekzemple: Mi manĝos panon. Mi estas manĝonta panon.
Pano estas manĝota de mi.

**INT-IT**

Ili indikas la preteriton kaj konsideras la agon, kiam ĝi jam okazis.

Ekzemple: Mi manĝis panon. Mi estas manĝinta panon.
Pano estas manĝita de mi.

La kunmetaĵo verbradiko-participfinaĵo povas akcepti la finaĵojn "**o**", "**a**" kaj "**e**" por formi respektive substantivojn, adjektivojn kaj adverbojn.

Ekzemple: Manĝanto ; manĝanta ; manĝante ; manĝonte ; manĝonta ; manĝonto ; lernita ; lernite, ktp.

a) Aktivaj participoj

Ili estas la participoj kun la finaĵoj **ANT, INT** kaj **ONT.** Ili montras, ke ilia subjekto faras la agon esprimatan de la verbo.

Ekzemple: Mi manĝas panon: Mi faras la agon de manĝado, do mi estas manĝanta panon, aŭ, mi estas (la) manĝanto de la pano.

Povas okazi, ke, kiam mi manĝas, mi babilas. Do, mi povus diri: Manĝante panon, mi babilas.

Do: Kiu manĝ**as**, tiu estas manĝ**anto**.

Kiu manĝ**os**, tiu estas manĝ**onto**.
Kiu manĝ**is**, tiu estas manĝ**into**.

**EKZERCO.** Laŭ la modelo "Mi manĝas panon; mi estas manĝanta panon; mi estas la manĝonto" kompletigu:

a) Mi kuras; ........................... ; ...............................
b) La lernantoj ludas violonon;..............;......................
c) ............................ ; mi estas amanta vin; .............
ĉ)...................... ; .....................; li estas lernonto.
d) Ili petis helpon; .................. ; ...............................

Rim.1: Oni devas atenti pri la uzo de la adverba participo. La verbo participa kaj la sekva devas havi la saman subjekton (aganton).

Ekzemple: Manĝonte, mi lavas miajn manojn.
(Mi manĝos; tial, mi lavas miajn manojn.)
Manĝinte, mi iris al la lernejo.
(Post kiam mi manĝis, mi iris al la lernejo.)
Laborante, mi ne manĝas.
(Kiam mi laboras, mi ne manĝas.)
Laborinte, mi trinkas.
(Post kiam mi laboris, mi trinkas.)

**EKZERCO:** Konstruu du frazojn per ĉiu el la adverbaj participoj, kaj klarigu ilin laŭ la ĉi-supraj ekzemploj (de 1 ĝis 4).

b) Pasivaj participoj

Temas pri la participoj en **AT**, **IT** kaj **OT**. Ili indikas, ke la subjekton trafas la ago esprimata de la verbo.
Ekzemple: Mi manĝas panon. Pano estas manĝata de mi.

Okazas ĉiam, ke, kiam oni manĝas ion (do ankaŭ panon), tio malsekiĝas en la buŝo. Do: Manĝate, la pano malsekiĝas.

FINE: Kion oni manĝas, tio estas manĝata: do, la manĝato.
Kion oni vidos, tio estas vidota; do, la vidoto.
Kion oni ŝatis, tio estas ŝatita: do, la ŝatito.

**EKZERCO.** Laŭ la jena ekzemplo "Mi trinkas vinon; vino estas trinkata; vino estas la trinkato" transformu la jenajn frazojn:

1. La lernantoj faris matematikan taskon.
2. La Esperantistoj ne konas diskriminacion.
3. La invititoj ne surmetas jakojn.
4. AFI ne amis sian patron.

Rim.2: Kaptite, la fiŝo mortas.
Kiu estas kaptita? Kiu mortas?
Komprenindas, ke la fiŝo estas la subjekto de "kaptite" kaj de "mortas". Vidu Rim.1 !

**EKZERCO**

1. Faru du frazojn per ĉiu el la adverbaj participoj pasivaj kaj klarigu laŭ la ekzerco sub Rim.1.
2. Laŭ la modelo "Mi manĝas panon; la pano estas manĝata de mi; mi estas la manĝanto, kaj la pano, la manĝato." kompletigu:
   a) Mi amas vin; ......... ; ..................., ......................
   b) ......... ; .......; li estas la farinto de la peko, ............
   c) Li posedas biciklon; ......... ; .........., ........................
   ĉ) Ŝi ............. ; ........... ; ......kaj la pilko, la perdito.

Rim.3:

a) La netransitiva verbo ĝenerale ne povas havi pasivan participon. Ĉu vi povas klarigi la kialon?
b) Mi kaptis fiŝon. La fiŝo estas kaptita de mi.
Rimarku la uzon de la prepozicio **DE**. Ĝi estas ĉiam uzata por montri la aganton.
Ekzemple: Mia patrino kudras mian veston per kudrilo.
do: Mia vesto estas kudrata **de** mia patrino ...
Mia nazo estas vundita de ŝi per klingo.
aŭ: Ŝi vundis mian nazon per klingo.
Konklude: atentu pri la uzo de **PER** kaj **DE**.
Komparu: La letero estas skribita **de** ŝi.
La letero estas skribita **per** krajono.

c) Participaj epitetoj

Oni povas uzi epitete la participojn adjektivajn.

Ekzemple: La viro manĝas kaj trinkas.
do: La manĝanta viro trinkas; aŭ: la trinkanta viro manĝas.
Mi ŝatas la panon, kiun vi bakas.
do: La panon ŝatatan de mi vi bakas; aŭ: Mi ŝatas la panon bakatan de vi.
Mi vidas la fraŭlinon, kiu drinkis brandon.
do: Brandon trinkis la fraŭlino vidata de mi.
aŭ: Mi vidas fraŭlinon drinkintan brandon.
La de mi vidata fraŭlino drinkis brandon.

ATENTU: Ne intermiksu epiteton kaj predikativon objektajn (aŭ de la rekta komplemento)!

Komparu: Mi vidas la fraŭlinon drinkintan brandon. (1)
Mi vidas la fraŭlinon drinkinta brandon. (2)

La frazo (1) montras, ke estas aliaj fraŭlinoj, sed nur tiun, kiu jam drinkis brandon, mi vidas.
La frazo (2) montras, ke mi vidas la fraŭlinon, post kiam ŝi drinkis brandon.

SCIINDAS ke la verboj, kiuj enkondukas la predikativan objekton, estas plejofte perceptaj mens-agaj verboj. Citindaj estas: aŭdi, vidi, aŭskulti, rigardi, opinii, trovi, taksi, ktp.

Ekzemple: Mi vidas lin ploranta pro ĝojego.
Li trovis sian amikinon vundita.

**EKZERCO**

1. Mi legas la amuzan rakonton, kiun vi rekomendis al mi; mi legas la amuzan rakonton rekomenditan de vi al mi; mi legas la de vi al mi rekomenditan rakonton.
   a) Faru frazojn laŭ tiu supra modelo.
   b) Transformu la jenajn frazojn laŭ la sama modelo.
      I. La fiŝo, kiun mi kaptos, estas granda.
      II. Li promenas kun la viro, kiu ebriiĝos.
      III. Ili forpelis la ŝteliston, kiu kuregis.
      IV. Ŝi faris la taskon, kiun vi donis al la lernanto.
2. Ĉu vi povas fari pliajn tiajn transformojn?
   I. Mi vidas la lernanton, kiam li trinkas sukon.

II. La instruisto surprizis KOĜOn, kiam li estis insultanta lin.
III. JAO rigardis la hundon, kiu manĝas fekaĵojn.
IV. Mi aŭdis la infanojn, kiuj ploris.
Mi aŭdis la infanojn, kiam ili ploris.

## 2. ĴUS - TUJ

"**ĵus**" signifas "ĝuste antaŭ", dum "**tuj**", "ĝuste post". Komprenindas, ke oni ofte akompanigas **ĵus** per preterito, kaj **tuj** akompanas la futuron. (vidu ĉe dua parto "Adverboj").

Ekzemple: Mi ĵus manĝis (antaŭ kelkaj - nur kelkaj - momentoj mi manĝis).
Mi tuj manĝos (post kelkaj - nur kelkaj - momentoj mi manĝos).

NOTINDAS, ke oni povas uzi la futuron participan anstataŭ la adverbon **tuj**.

Ekzemple: Mi estas manĝonta = Mi tuj manĝos.
La pano estas manĝota = La pano tuj estos manĝita.

El tio sekvas, ke la futura participo montras pli da certeco pri la okazado de la ago ol la simpla futuro.

Ekzemple: Mi manĝos. Kiam? Iam (povas esti tuj aŭ pli poste)
Mi estas manĝonta. Kiam? Post mallonga tempo.

## 3. EĈ - MEM

"**eĉ**" signifas "ne nur, sed plie; sed krom tio". **Mem** insiste montras identecon de la konsiderata persono aŭ afero.

Ekzemple: Mi ne manĝis eĉ paneron. (Mi nenion manĝis; ankaŭ panero hazarde ne falis sur mian langon).
Mi ne manĝis mem paneron. (Iu alia devigis min manĝi paneron).
Mi manĝas mem panon. (Laŭ propra volo mi tion manĝas).

**EKZERCO.** Klarigu ĉiun el la frazoj de la paro.
a) Mi trinkas vinon mem. Eĉ mi trinkas vinon.
b) Mi mem manĝas fungojn. Mi eĉ manĝas fungojn.
c) Li parolos mem pri tio. Li parolos eĉ pri tio.
ĉ) Ili vidis eĉ la lupon. Ili vidis mem la lupon.

KONSILINDAS,

ke **mem** troviĝu ĝuste antaŭ la persono (aŭ afero), kies identecon ĝi insiste montras. Do: "Mi mem manĝas" estas pli bona ol "mi manĝas mem".

-=-=-=-=-=-

Poemeto:

**KIEN MIA KOR' ?**

Jen supren,
Jen malsupren!
Jen dekstren,
Jen maldekstren!
Ci neniam plu estas en mi.
Kien ci iras?
Kial tiu vagado?
Ĉu por retrovi cian karmemoran?
Jam estas for la plej de vi amata.
Jam estas tolerebla tiu katastrofeto.
Kaj ci mem konsolas min.
Kial do nun ci tiom vagadas?
Ne reveku mian triston!
Ĉesu! Ĉesu! Tiu batado ĉesu!
Trankviliĝu, mia kor' !
Paciencîĝu, mia kor'!
Ripozu, mia kor'!
Esperu, mia kor'!

ĈIO PER SI MEM ARANĜIĜOS.

==========

*"Pura ĉielo fulmon ne timas."*

# stampu

*"Kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝas."*

# AFIKSOJ

## 1. Sufiksoj

**AĈ** : montras malbelan eksteran aspekton, senvalorecon, maltaŭgecon, malestimemon, ktp.
Ekzemple: Domaĉo estas malbela domo.
Homaĉo estas malbela (aŭ malestimata) homo.
Manĝaĉi estas malbele manĝi.
Kriaĉi estas maltaŭge krii.
Oni povas uzi ĝin memstare.
Ekzemple: Aĉa ĉevalo. Aĉa viro.

**AD** : montras:
- Daŭron, pluigon, aŭ (daŭran) agon.
  Ekzemple: La infanoj ploradas (daŭre ploras).
- Agon de iu verbo.
  Ekzemple: La ir-ado al TOGOVIL daŭris 10 minutojn.

**AĴ** : montras konkretan objekton, manifestiĝon de ekstera sento.
Ekzemple: Manĝaĵo : io, kion oni manĝas.
belaĵo : io bela.
amikaĵo : amika ago.
Kun nomo de io manĝebla, ĝi signifas manĝaĵon.
Ekzemple: Porkaĵo : viando de porko.
Ovaĵo : manĝaĵo el ovo(j).
Oni povas ĝin uzi memstare.
Ekzemple: Kiuj estas tiuj nigraj aĵoj, kiuj brilas en la saŭco?

**AN** : montras:
- membron de grupo, loĝanton de iu loko.
  Ekzemple: Togolandano estas ano de Togolando.
  UEA-anoj, SEM-anoj.

- Adepton de iu doktrino:
  Ekzemple: Kristano, bahaano, ktp.
  **AN** estas uzebla memstare.
  Ekzemple: La anoj de tiu grupo estas afablaj.
  Mi aniĝis al tiu grupo. Li anigis min al la grupo.

**AR** : esprimas kolekton da objektoj aŭ estuloj de la sama speco en aparta grupo.
Ekzemple: homaro = tuto de la homoj.
Esperantistaro.
**AR** estas memstare uzebla.
Ekzemple: aro da bestoj.
Arigi la lernantojn. La lernantoj ariĝos.

**ĈJ** - **NJ** : Ili estas metataj ofte post la unuan silabon de nomoj por formi karesajn nomojn. "**ĉj**" estas uzata por viroj, dum "**nj**", por virinoj.
Ekzemple: Paĉjo = karesnomo de Patro.
Panjo = karesnomo de Patrino.

**EBL** : montras, ke io povas esti farata.
Ekzemple: Io manĝebla (kion oni povas manĝi).
**EBL** povas esti memstare uzata.
Ekzemple: La restado sur la luno estas ebla.
**ebl**i, **ebl**igi, **ebl**e estas ofte uzataj.

**EC** : esprimas abstraktan ideon de kvalito, aŭ staton.
Ekzemple: La bonecon de tiuj homoj oni rimarkis tra iliaj faroj.
Ĝi povas esti memstara.
Ekzemple: La ecoj de tiuj lernantoj estas malbonaj.

**EG** : montras plej altan gradon de grandeco.
Ekzemple: Tre granda fenestro estas fenestrego.
Elefanto estas grandega besto.
La edzino de KOĜO estas bela, tiu de KOSI, belega.
Li manĝegis (tre multe manĝis).
Ĝin oni memstare uzas.
Ekzemple: Egan dankon! Mi ege ŝatas fromaĝon.
Ŝi estas ege bela.

**EJ** : montras lokon destinatan por io, esprimita de la radiko.
Ekzemple: manĝejo : kie oni manĝas.
panejo, birdejo, kafejo, ktp.
Ĝin oni uzas ankaŭ memstare.
Ekzemple: La ejo de nia Esperanto-grupo.

**EM** : montras, ke oni ŝatas ion, inklinas fari ion, aŭ kutimas fari ion.
Ekzemple: Li estas manĝema. Esperantistoj estas pacemaj. Vi estas amikema. Pigraj lernantoj estas dormemaj.
Uzate memstare, ĝi signifas inklinon (ne)-daŭran.
Ekzemple: Mi sentas la emon manĝi. Mi emas dormi.
Mi sentas manĝemon. Mi sentas dormemon.

**ER** : montras unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo.
Ekzemple: Panero ; sablero ; kretero, ktp.
Ĝi estas uzata ankaŭ memstare.
Ekzemple: Mi ne komprenas, kial la eroj de tiu blanka kreto estas flavaj.
Erigi kreton: transformi ĝin en erojn.

**ESTR** : montras iun, kiu estas ĉe la supera kaj unua rango de io, kaj posedas efektivan ordonpovon.
Ekzemple: Liceestro ; grupestro ; klubestro.
Ĝi estas uzata ankaŭ memstare.
Ekzemple: La estro de tiu lernejo. Mi estras tiun klubon.

**ET** : esprimas ideon de plejmalgrandeco.
Ekzemple: Dometo estas malgranda domo.
Ĝi uziĝas ankaŭ memstare.
Ekzemple: La eta princo venos.

**ID** : montras ideon de naskiteco, disĉipleco, deveneco, k.s.
Ekzemple: Katido estas infano de kato.
Israelidoj estas devenantoj de Israelo.
Rim.: Por bestoj kaj plantoj oni uzas "**id**" por signifi "juna naskito" sed homaj plenkreskuloj estas Adamidoj (almenaŭ se la Biblio pravas).
Ĝi estas uzata ankaŭ memstare.
Ekzemple: La idoj de la hundoj. La idoj de SOKRATO.

**IG** : signifas agi tiamaniere, ke
- io estu tia, kiel esprimas la radiko.
  Ekzemple: Mi akrigas la tranĉilon. Mi manĝigas la panon.
- io aŭ iu faru tion, kion esprimas la radiko.
  Ekzemple: Li manĝigas min.

ATENTU: Mi donas al vi la panon, kaj vi ĝin manĝas. Tio signifas, ke "mi manĝigas vin - Mi manĝigas la panon". Ĉu oni devas skribi: "Mi manĝigas vin la panon"? La frazo ne estus komprenebla. Do, konsilindas uzi prepozicion por anstataŭigi unu akuzativon.
Do: Mi manĝigas la panon al vi.
aŭ: Mi manĝigas vin per pano.

- iu aŭ io estu en la loko esprimata de la radiko.
  Ekzemple: Enkapigi = meti en la kapon.
  Surtabligi = meti sur tablon.
  Elpoŝigi = forpreni el poŝo.

Jam rimarkiĝis la memstareco de **IG**.
Ekzemple: Mi igas la infanojn plori.
Mi igas la kreton nigra.

**IĜ** : montras ŝanĝon de stato.
Ekzemple: Akriĝi = (far)iĝi akra.
Grandiĝi = (far)iĝi granda.
Aŭdiĝi = iĝi aŭdata.
Ĝi estas uzata ankaŭ memstare, kiel la antaŭa ekzemplo tion montris.

**IL** : montras la instrumenton, per kiu oni faras ion.
Ekzemple: Tranĉilo = ilo por tranĉi.
Ludilo = ilo por ludi.
Komprenindas, ke "**IL**" povas memstari en frazoj.

**IN** : montras la sekson organizitan por naski.
Ekzemple: Hundino, Patrino, Katino, ktp.
Ĝin oni uzas ankaŭ memstare.
Ekzemple: La inoj kolektiĝu.
La inaj floroj: floroj, kiuj havas econ de ino.

**IND** : montras, ke oni meritas tion, kion la radiko esprimas.
Ekzemple: Io ŝatinda = io meritanta ŝaton.
Iu aminda = iu meritanta amon.

Ĝin oni uzas ankaŭ memstare.

Ekzemple: Mi ne indas tion = mi ne estas inda je tio = mi ne meritas tion.
Sen-ind-ul-o (aŭ senindulo) = homo sen valoro kaj sen merito.

**ING** : montras objekton, kiu entenas parton de iu alia.

Ekzemple: Kandelo staras en la kandelingo kaj brulas.
La cigaringo kuŝas apud la alumetaro.

Ĝi estas ankaŭ memstare uzata.

Ekzemple: La fingringo estas la ingo, per kiu la tajloroj ŝirmas fingron.

**ISM** : signifas doktrinon, okupon, agadon, k.s.

Ekzemple: Kristanismo = doktrino aŭ religio de la kristanoj. Fetiĉismo, spiritismo, kanibalismo, vandalismo, ktp.

Ĝi estas ankaŭ memstare uzata.

Ekzemple: La ismo de GOTAMA estas Budhismo.

**IST** : montras

- personon, kies profesion signas la radiko.
  Ekzemple: Panisto, juvelisto, ploristo, lernigisto, ktp.
- anecon al iu doktrino aŭ teorio.
  Ekzemple: Esperantisto, rasisto, budhisto, ktp.

Notindas, ke por multaj teorioj en **ISM** oni povas anstataŭigi la literon "**m**" per "**t**" por nomi la adeptojn.

| Ekzemple: | | |
|---|---|---|
| | Turismo | turisto |
| | Budhismo | budhisto |
| | Egoismo | egoisto |

**OBL** : montras, ke la konsiderata objekto havas ĝuste kvanton tiomfoje, kiom indikas la radiko.

Ekzemple: dekalitro estas dekoblo de litro.
Duoblo de kvin estas dek.

**OBL-igi** signifas ripeti plurfoje saman kvanton.

Ekzemple: Multobligi kvin = 5 + 5 + 5 + 5 + ...... + 5
Triobligi sep = 7 + 7 + 7 = 3 x7

Ĉu oni povas (aŭ rajtas) skribi: "sesdek tri estas oblo de sep"? Pravigu la respondon!

**ON** : Unu X-ono de io estas unu el la X egalaj partoj de tio; X estas entjero.
Ekzemple: X-ono de A = A: X = $\frac{A}{X}$

Du-ono de kvin estas $\frac{5}{2}$

Triono de dudek unu estas sep.

Ĝi estas uzebla memstare, ankaŭ en la senco de parto de io, kio konsistas el disigeblaj partoj.
Ekzemple: Ono de ajlo ; ono de kolao.
**ON**-**igi** ion = meti ion en onojn.

**OP** : Vidu paĝon 53.

**UJ** : montras

- objekton, kiu povas enhavi tuton de io alia indikata de la radiko.
  Ekzemple: Manĝujo, cigarujo, ktp.
- objekton utilantan por fari ion indikatan de la radiko.
  Ekzemple: Banujo, pisujo, kraĉujo, ktp.
- arbon, kies frukton indikas la radiko.
  Ekzemple:Pomujo, mangujo, ktp.
  Rim.: Tiu signifo arkaikiĝas parte pro la konfuzo "Kio estas pomujo? Ĉu ujo por pomoj? Ĉu pomarbo?".
  Nun treoftiĝas la kvazaŭ-sufikso -**ARB**. Do, pomarbo estas pli taŭga.
- landon, kies genton indikas la radiko.
  Ekzemple: Francujo, Japanujo, Egiptujo, ktp.
  Aldonindas, ke nun treoftiĝas la uzo de "**IO**" anstataŭ "**UJ**". Ekzemple: Francio, Japanio, Egiptio, ktp.

Ĝi estas memstare uzebla en la senco de vazo aŭ kesto enhavanta tutajn objektojn.

**UL** : montras vivantan estaĵon signatan de la radiko.
Ekzemple: Fremdulo : fremda homo
Eminentulo, ludulo, atentulo, vagulo, ktp.
Dikulo estas persono (aŭ ulo) dika.
-**UL** estas memstare uzebla kaj ofte kun nuanco mok-

eta (iom moka).
Ekzemple: Kiu estas tiu ulo, kiu pisas tie?

**UM** : estas uzata por

- esprimi malprecizan agon, staton, kvaliton, kiujn la radiko ne sufiĉe klare povas montri per aliaj sufiksoj.
  Ekzemple: Malvarmumi : senti malvarmon, fariĝi malsaneta pro malvarmo.
  Fingrumi : fari ion neprecizan per fingroj.
  Brakumi, ventumi, aerumi, plandumo, kalkanumo, ktp.
- signi parton de vesto kovranta parton de la homa korpo indikatan en la radiko.
  Ekzemple: Kolumo : tiu parto de la ĉemizo, kiu estas ĉirkaŭ la kolo.
  Manumo, plandumo, ktp...

## ALDONAĴOJ

**END** : montras, ke io devas esti farata.
Ekzemple: Punenda homo: homo, kiun oni devas puni.
Manĝenda pano.

**IV** : montras, ke la priparolato havas la kapablon plenumi tion, kion la radiko esprimas.
Ekzemple: Produktiva : produktokapabla.
Sorĉiva : sorĉopova.

**IZ** : signifas

a) Provizi per, kovri per.
Ekzemple: Orizi : kovri per oro.

b) Apliki metodon elpensitan de iu, kies nomon aludas aŭ konigas la radiko.
Ekzemple: Pasteŭrizi, galvanizi, ktp.

c) Submeti individuon aŭ organon al procedo aŭ kirurgia agado.
Ekzemple: Kaŭterizi, hipnotizi, ktp.

**OZ** : signifas "riĉa je, provizita per, plena de..."
Ekzemple: Post kiam mi orizis mian krajonon, ĝi fariĝis oroza.
Post pluvo, kelkaj stratoj estas kotozaj.

**UN** : tiu vorteto estas nun enkondukiĝanta por signi farunon faritan el vegetalaĵo, kies nomon indikas la radiko.
En Togolando, ekzemple, multaj tiaj farunoj ekzistas, kaj ŝajnas tre pezaj la esprimoj: maniokfaruno, maizfaruno, fazeolofaruno, ktp.
Do, nun, simple: maniokuno, maizuno, fazeoluno, ktp.
GRAVE: Uzante tiun ĉi sufikson, oni devos aldoni piednoton por esti komprenata.

## 2. Prefiksoj

**BO** : montras pro-edziĝan parencecon.
Ekzemple: La frat(in)o de mia edz(in)o estas mia bofrat(in)o.
Bogepatroj, boparencoj.
La edz(in)o de mia fil(in)o estas mia bofil (in)o.
Rimarko: Pro la poligamia situacio en Afriko, la bezono uzi prefikse la vortetojn **DUON**- kaj **VIC**- tre forte sentiĝas.
- Duon-frat(in)o estas fil(in)o de alia edzino de mia patro, aŭ de alia edzo de mia patrino.
- Vic-patro estas alia edzo de patrino.
Vic-patrino estas alia edzino de patro.
Vicfil(in)o estas fil(in)o de edz(in)o.
Vic-frat(in)o estas fil(in)o de vicpatr(in)o.
Vicparencoj estas parencoj de vicpatr(in)o.

NOTINDAS, ke
- Duonfrat(in)oj de iu havas ĉu komunan patron, ĉu komunan patrinon kun tiu.
- Preskaŭ-parencoj ekzistas.
Preskaŭparenco = preskaŭa parenco.
Do, ironie oni diras: Preskaŭfrato de iu = nepo de la patro de konato de la amiko de la frato de tiu.

**DIS** : montras, ke la priparolataj objektoj ne restas kune.

Ekzemple: Dismeti : malkune meti.
Disiri : iri diversdirekte.
La folioj de la arbo disfalis.

Oni povas uzi ĝin en la formoj **DISA** kaj **DISE**.

Ekzemple: Kolektu la disajn foliojn.
Remetu ilin dise sur la tablon.

**EK** : montras subitan komenciĝon de iu ago, nedaŭran agon.

Ekzemple: Mi ekploras : mi komencas plori.

Oni povas substantivigi, verbigi, adverbigi kaj adjektivigi ĝin.

Ekzemple: La laboro ekas je la tria.
Eke de la laboro mi manĝas.
La eko de ĉiu afero estas malfacila, sed la eko de geedziĝo, miela.
La eka instruado = la instruado de la eko (komenco).

NOTINDAS, ke

- **ekde** = de la eko de = eke de
- **EK** estas la kontraŭo de **AD**.

**EKS** : montras, ke iu aŭ io estis, kaj ne plu estas.

Ekzemple: Eksministro mortigis sin.
Eksgeedziĝi = ne plu esti geedzoj.
Eksigi iun el grupo = ne plu akcepti lin, kiel membron de la grupo.

Oni ofte renkontas la vorton **EKSA**.

**GE** : montras kunecon de ambaŭ seksoj.

Ekzemple: Miaj patro kaj patrino estas miaj gepatroj.
Viro kaj virino estas geviroj.
Lernanto(j) kaj lernantino(j) estas gelernantoj.

NOTINDAS, ke

- Gebestoj kutime signifas nur "unusola virbesto kune kun unusola samspeca inbesto, aŭ paro de vir- kaj in-bestoj", tamen utiligindas, kiam temas pri pluraj bestoj de ambaŭ seksoj.
- "**gea**" rilatas al ambaŭ seksoj.
  Ekzemple: Gea grupo = grupo konsistanta el persono de ambaŭ seksoj.
- "**geiĝi**" signifas "pariĝi, sekskuniĝi".

**MAL** : montras la kontraŭon.
Ekzemple: Elefanto estas granda, kaj muso, malgranda.
Oni povas memstare uzi **MAL**:
- kiam mi songâs pri io, ĉiam okazas ĝia **malo**.
- Mi ne manĝis, **male**, mi vomis.
- La **mala** kapflanko de la nuko estas la vizaĝo.

**RE** : montras ripetadon, denovan iron al iu loko aŭ stato, kiun oni forlasis.
Ekzemple: Remanĝi, reveni, refreŝigi, ktp.
Doni reen = redoni kion oni jam prenis.
Doni ree = redoni, doni denove.
Iri reen = returniri.
Iri tien kaj reen = iri kaj reveni (plurfoje).

**FI** : montras malbonecon, ne aspektan, sed karakteran, spiritan, konsciencan, moralan, k.s.
Ekzemple: Fihomo = homo, kiu maldece (aŭ krime) kondutas.
NOTINDAS, ke
"Fihomo" povas esti homaĉo aŭ bela homo, sed "homaĉo" povas esti fihomo, sed ne bela homo.

**PRA** : montras pli malproksiman gradon de parenceco, ĉu antaŭa, ĉu posta.
Ekzemple: La prapatro estas patro de avo.
Pranepo estas nepo de nepo.
Ĉu vi povas klarigi la jenajn vortojn "Praŭloj" kaj "Praidoj"?
**PRA** estas adjektivigebla kun la signifo de antikva, antaŭhistoria, primitiva.
Ekzemple: Faro de fajro per ŝtonoj estas praa kutimo.

==***==

*"Rapidu malrapide."*

*"Morgaŭ estas la amata tago de la mallaborulo."*

# PREPOZICIOJ

## 1. Listo

**al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malantaŭ, malgraŭ, per, po, por, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans.**

## 2. Klarigoj pri iliaj uzoj

**AL** : por signi direkton, celon, destinon, kompletigon, ktp.
Ekzemple: Mi iras al vi. Li parolas al vi. Aldonu 2 al 4. Donu al mi vian monujon. Montru al mi viajn manojn. Mi prezentas al vi mian fraton.

**ANSTATAŬ** :

- Anstataŭ manĝi, mi trinkas. (Tio montras, ke mi devus manĝi, sed pri ia kialo, mi nur trinkas.)
- Mi vidas Paŭlon anstataŭ Petron. (1)
  Mi vidas Paŭlon anstataŭ Petro. (2)

(1) montras, ke mi devus vidi Petron, sed ne povas. Mi nun vidas Paŭlon en la loko (plenumantan la rolon) de Petro.
(2) montras, ke Petro devus vidi Paŭlon, sed ne povas. "Mi" plenumas la rolon de Petro.
NOTU: la uzon kaj ne-uzon de la akuzativo en la ekzemplo.

**ANTAŬ** : signas tempon, lokon, preferon, direkton, ktp.
Ekzemple: Mi sidas antaŭ vi. Mi venis antaŭ la dua horo. Mi ŝatas vinon antaŭ biero. Mi iras antaŭ vi.
Rim.:

a) Kiam **ANTAŬ** devas kunligi du propoziciojn, tiam oni prefere uzas **ANTAŬ OL**.
Ekzemple: Mi manĝis, antaŭ ol vi venis.
Mi vidis JAOn, antaŭ ol KOĜO (vidis JAOn).

b) Kiam **ANTAŬ** signas almovon, tiam la akuzativo devas esti uzata.

Ekzemple: Mi iras antaŭ vin (Mi estis malantaŭ vi, kaj nun iras antaŭ vin).

SED "Mi iras antaŭ vi" montras, ke mi estas antaŭ vi, kaj iras antaŭ vi.

Mi metas la glason antaŭ vin. (1)
Mi metas la glason antaŭ vi sur la tablon (2).

En la frazo (1) estas VIN, ĉar la antaŭo de VI estas la celo de la ago. En (2) la celo de la ago estas TABLO (kiu jam estas antaŭ vi): do, la TABLO ricevu la akuzativan "**n**".

Konklude: En tiaj kazoj oni devas akuzativigi nur la precizan celon de la ago.

**APUD** - **ĈE** signas proksimecon.

**ĈE** havas en si ideon de tuŝo, dum **APUD** ideon de ne-tuŝo.

Ekzemple: Mi estas apud la tablo (do, mi ne ĝin tuŝas).
Mi estas ĉe la tablo (mi ĝin tuŝas).

Rim.:

a) Oni povas uzi la akuzativon post "**apud**" kaj "**ĉe**"; tio dependas de la kunteksto.

Ekzemple: Mi iras apud (aŭ ĉe) la tablo (1).
Mi iras apud (aŭ ĉe) la tablon (2).

En la ekzemplo (1), mi estas apud (aŭ ĉe) la tablo, kaj iras apud (aŭ ĉe) ĝi.

(2) montras, ke mi estis for de la tablo, kaj nun iras apud (aŭ ĉe) la tablon.

b) Oni povas uzi **ĈE** alisence:

- Ĉe la nigruloj estas gigantoj (inter la nigruloj...)
- Li mortis ĉe mia alveno (... kiam mi alvenis).
- Mi tranoktis ĉe mia amiko (... en la domo de mia amiko).

**ĈIRKAŬ** signifas:

- Ronde de

Ekzemple: La arboj staras ĉirkaŭ la domo.

- Proksimume
  Ekzemple: Li havas ĉirkaŭ kvar jarojn.
  Mi venos ĉirkaŭ (je) la oka horo.

**DA** : indikas nedifinitan mezuron.

Ekzemple: Iom da mielo. Maro da murdistoj.
Da pano li manĝis du kilogramojn.
Mi timas tiun garnizonon da abeloj.

**DE** : estas uzata por montri

a) apartenecon aŭ havecon.
Ekzemple: La libro de KOFI. (aparteneco).
La libro de la verda koloro. (haveco)
(aŭ: la libro kun la verda koloro)

b) deirpunkton, devenon.
Ekzemple: Mi iras de LOME al ANEHO.
La eraro venas de li.
De la oka ĝis la naŭa horo okazos la kurso.
De tri jaroj mi lernas Esperanton.

c) aganton kun participo pasiva.
Ekzemple: La libro legata de Hemmo.

ĉ) apartaĵon de priparolata aĵo.
Ekzemple: Tranĉaĵo de tiu ĉi pano.
Peco de la nigra ŝtofo.

d) la subjekton (aŭ aganton) de la ago, kiun esprimas substantiviĝo de la verbo.
Ekzemple: Manĝado de la infanoj.
Kuirado de la terpomoj.
Instruado de la nigruloj.
Trompado de la koloniistoj.

Rim.: Tiu uzo kelkiam naskas konfuzon.
Ekzemple: Trompado de la koloniistoj.
Ĉu la koloniistoj trompas? Ĉu la koloniistojn oni trompas? Por pli klare montri la subjekton oni devas uzi "**FARE DE**" aŭ ĝian simpligitan formon "**FAR**".
Ekzemple: Trompado fare de la koloniistoj.
Trompado far la koloniistoj.
Manĝado de la papilio far la araneo.

e) gramatikan dependecon
Ekzemple: Telero plena de rizo. Iru for de ĉi tie!

**DUM**: en la daŭro de.

Ekzemple: Mi naĝis dum la lasta tago de Aprilo.
Dum tri horoj plenaj li ronkis.

**EKSTER** : malinterne de.

Ekzemple: Mi estas ekster la domo.
Mi iras ekster la koridoron.

Rim.: Oni povas ĝin uzi ankaŭ kun la signifo de **KROM**

**EL** : montras

- lokon, de kies interno oni fortiriĝas.
  Ekzemple: Mi iris el la domo.
- ion, for de kio io estas prenata.
  Ekzemple: Rakonto el la Biblio.
- ion, kio konsistigas ion alian.
  Ekzemple: Saŭco el legomoj.
- ŝtatanecon, devenon.
  Ekzemple: Tiu viro el Francio.

**EN** : signifas "interne de".

Ekzemple: Mi loĝas en la nigra domo.
Li vivas en danĝeroj.
En aprilo okazas festego en nia vilaĝo.

Rim.: La lasta ekzemplo montras al ni, ke la festego ne okazas la tutan monaton Aprilo, sed dum kelka(j) tago(j). Do, kontraste kun DUM, EN indikas nur parton de la menciita tempo.

**ĜIS** : montras la punkton, kiun oni devas atingi sen ĝin transpasi aŭ preterpasi.

Ekzemple: Mi iras ĝis LOME.
Li atendis min ĝis la deka horo.

**INTER** : montras la pozicion, situacion, momenton de io aŭ iu, kiu apartigas objektojn, homojn, momentojn, ktp.

Ekzemple: La truo troviĝas inter la muroj.
Mi estos hejme inter la dua kaj kvara horoj.

Ĝi indikas ankaŭ "kunecon".

Ekzemple: Inter amikoj estu ĝentila!
Tia afero estas inter ni dirita. (sekreto)

**JE** : estas uzata, kie la senco ne montras klare kia prepozicio konvenas.

Ekzemple: Mi foriros je la tria horo.
Mi prenis lin je la mano. (lian manon)

Komparu kun: Mi prenis lin per la mano.

**KONTRAŬ** signifas

- "en alia flanko", inversan direkton.
  Ekzemple: Mi naĝas kontraŭ la fluo.
  Mia domo staras kontraŭ policejo.
- malamikan konduton.
  Ekzemple: Batali kontraŭ iu. Lukti kontraŭ malfeliĉo.
- ŝanĝon de varo.
  Ekzemple: Ŝanĝi panon kontraŭ papero.
  Pagi ion kontraŭ io alia.
  Doni filinon kontraŭ doto.

**KROM** signifas

- ekskluzivecon.
  Ekzemple: Krom li ĉiuj lernis la lecionon.
- ne nur, sed. Tiuokaze oni uzas **KROM... ANKAŬ.**
  Ekzemple: Krom Petron mi vidis ankaŭ Paŭlon. (1)
  Krom Petro, ankaŭ mi vidis Paŭlon. (2)
  (1) montras, ke "MI" vidis kaj Petron kaj Paŭlon.
  (2) montras, ke kaj "mi" kaj Petro vidis Paŭlon.
- plie, ekster tio. Tiam oni ĝin uzas en la formo "Krom tio, aŭ: Krome".
  Ekzemple: Krom tio, ke li pigras, li estas afabla.
  Li kantas; krome, li babilas.

**KUN** havas la sencon de akompanado, ligiteco, unuiĝo, ktp.

Ekzemple: Mi iros kun vi. Li prenis kun si pafilon.
Mi saĝumas kun amikoj.
Li skribas kun intereso.
Mi metis la pomojn kun la pizoj.

**LAŬ** : esprimas konformecon, adaptiĝon, dependecon, referencon, k.s. Ĝi estas la malo de "**kontraŭ**".
Ekzemple: La fiŝoj iras laŭ la fluo de la rivero.
Iri laŭ aŭ kontraŭ io.
Mi faros laŭ viaj decidoj.

**MALGRAŬ** : montras fortan decidon fari, nekonsiderante malhelpon aŭ kontraŭstaron.
Ekzemple: Malgraŭ la pluvo li venis.

**PER** : montras rimedon aŭ ilon, kiu permesas fari ion.
Ekzemple: Mi vidas per la okuloj.
Li tranĉas per klingo.
La tablo estas kovrita de KOĜO per tuko kun verda koloro.
ATENTU: Ne uzu KUN, kiam PER taŭgas!
Ĉu vi memoras? Klarigu la diferencon inter la jenaj frazoj: "Mi rigardas lin per larmaj okuloj." kaj "Mi rigardas lin kun larmaj okuloj."

Rim.:
a) "**Pere de**" oni uzas por signi, ke oni faras ion per ies helpo. Ekzemple: Mi sendos al vi leteron pere de JAO.
b) "**Per**" estas verbigebla.
Ekzemple: Mi peras la leteron al vi. (la letero venas al vi pere de mi).

**PO** : Ĝi estas uzata, kiam temas pri distribuo.
Ekzemple: La lernantoj ricevas po du librojn. (ĉiu ricevas du).
Po du lernantoj ricevu unu kukon. (Oni donu unu kukon al ĉiu lernantoparo).
Po tri lernantoj ricevas librojn. (1)
La tri lernantoj ricevas librojn po tri. (2)
Cerbumu pri tiuj du lastaj ekzemploj: ĉu ili estas samsignifaj?
Nun ni vidu trian frazon havantan la samajn vortojn:
La lernantoj ricevas po tri librojn.
Ĉu "**po**" estas prepozicio? Ĉu adverbo? Pri la naturo de tiu vorto, gramatikistoj inter si diskutas, sed laŭ la Plena Analiza Gramatiko (PAG), "**po**" evoluis de prepozicio al adverbo.

Konsilindas uzi "**ĉiu**", kiam oni dubas pri la klareco de la **po**-uzo.

Ekzemple: La lernantoj ricevas po du libroj = ĉiu lernanto ricevas du librojn.
Po du lernantoj ricevas unu libron = ĉiu libro estas ricevata de du lernantoj.

Sed: "La lernantoj ricevas la librojn po du" estas neklara.

Konklude:

a) Metu **po** N (N estas baza numeralo) antaŭ la vorton, kiun ĝi difinas.

b) Anstataŭ "**po**" uzu "**ĉiu**" aŭ "**op**" (sufikso) por igi klara la frazon.

Ekzemple: Po du lernantoj sidas ĉe tablo = la lernantoj sidas duope = ĉe ĉiu tablo sidas du lernantoj.

Postskribo: Uzo de la sufikso "**OP**"

Ĝi montras kolektivecon, kaj kunigite al numeraloj aŭ kvantaj vortoj, ĝi signifas "ĉiuj kune", "en grupoj de".

Ekzemple: La lernantoj sidas triope (en grupoj de tri).
La ŝtelistoj venis triope (ĉiuj tri kune).

Ĝin oni povas uzi ankaŭ memstare:

**opa** = kolektiva ; **ope** = kolektive, unubloke ; **opo** = grupo de homoj havantaj komunan celon, por kiu ili kuniĝas.

Ekzemple: Ĉu la aserto pri la postmorta vivo ne estas opa sintrompo?
La spektantoj ope eniras la amfiteatron.
La Esperanto-movado en Togolando estas gvidata de opo da instruistoj.

**POR** : montras celon, destinon k.s.

Ekzemple: Ni manĝas por vivi. La libro estas por vi.

Rim.: Mi vivas, por ke mi helpu al aliaj homoj.
Notindas, ke post "**por ke**" oni devas uzi la volitivon.

**POST** : montras

- tempon pli malfruan.

Ekzemple: Mi manĝos post du horoj. Li venis post la tria (tago) de Julio.

- Lokon pli malproksiman. Tiuokaze ĝi signifas "**malantaŭ**"
  Rim.: **POST** kondutas kiel **ANTAŬ**, sed oni konstatas, ke la vorto **MALANTAŬ** ekzistas, kaj la vorton **MAL-POST** oni ne uzas.
  Rememorindas, ke **POST OL** = **POST KIAM.**

**PRETER** : montras lokon aŭ objekton, ĉe kies proksimeco oni pasas, sed iras plu.
Ekzemple: Li iras preter la urbo.
Li promenas preter la preĝejo.

**PRI** : signifas "koncerne (al)", "rilate (al)", "teme (de)".
Ekzemple: Mi pensas pri vi. Temas pri miaj gefiloj.
Rim. : notindas la uzo de la akuzativo, kiam oni forigas **AL** kaj **DE** de "koncerne al", "rilate al", "teme de"
Ekzemple: Rilate niajn aferojn, mi pli laboros ol antaŭe.

**PRO** : signas ĉefe kaŭzon kaj motivon.
Ekzemple: Mi malsekiĝis pro pluvo.
La amikoj venis pro la invito.
Rim.: Mi dankas pro (aŭ por) via helpo.
Oni rimarkas samsencon de PRO kaj POR. Tio estas ne ĝenerala. Ofte, estas diferenco inter PRO kaj POR.
Komparu: Mi aĉetis la librojn por vi. (1)
Mi aĉetis la librojn pro vi. (2)
(1) montras, ke la libroj estas donacotaj al "vi".
(2) povas esti, ke "vi" rekomendas la aĉeton de tiuj libroj, ĉar "vi" trovis ilin interesaj...
Plie, sciindas, ke PRO neniam staras antaŭ infinitivo.

**SEN** : signifas "en la foresto de", "en la ne-esto de".
Ekzemple: Mi laboras sen salajro. Li trinkas kafon sen sukero. Li vivas sen labori.
Rim.: La loko de "**sen**" antaŭ infinitivo ne estas malĝusta. Tamen, konsilindas anstataŭigi ĝin per la formo "ne ...ante". Ekzemple: Sen labori = nelaborante.

**SUB** : montras

- malsuperas pozicion kun aŭ sen tuŝo.
  Ekzemple: La kato dormas sub tablo.
  La hundo iras sub la liton.

-eksteran ŝajnon.

Ekzemple: Li prezentas sin sub la titolo Duko.
Li laboras sub la nomo ĜONKE.

- dependecon.

Ekzemple: Li laboras sub mia amiko.
En Afriko la edzinoj vivas sub la edzo.

**SUPER** : montras pozicion de io aŭ iu rilate al alia, kiu estas lokita malpli alte sen tuŝo.

Ekzemple: La lampo pendas super la tablo.
La instruistoj regas super la lernantoj.

**SUR** = **SUPER** kun tuŝo

Ekzemple: La kato saltas sur la tablo
La aŭtoj glite iras sur la kotozaj stratoj.

**TRA** : montras, ke oni iras de unu ekstremo de io al alia ekstremo.

Ekzemple: Mi iras tra la strato

**TRANS** : montras lokon malantaŭ obstaklo.

Ekzemple: Mi vidas mian domon trans la rivero.

Rim.: La kontraŭo de **TRANS** estas **CIS**

Ekzemple: Mi estas ĉe policejo kaj vidas mian domon trans la rivero: la policejo estas cis la rivero.

## ĜENERALA RIMARKO

a) Inter la prepozicioj oni povas distingi

1. La almovajn: **AL, ĜIS, TRA, PRETER.**
Ili indikas per si mem la almovon; do, oni ne bezonas uzi la akuzativon post ili.
Ekzemple: Mi venas preter la rivero.
La birdoj flugas tra la ĉielo.
2. Lokajn prepoziciojn.
Tiuj prepozicioj havas en si signifon de loko. Ili estas: antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, ekster, en, inter, kontraŭ, malantaŭ, post, trans (kaj cis). Ili povas postuli, laŭ la kunteksto, la uzon de la akuzativo, aŭ ne.
Komparu: Mi iras kontraŭ vin. Mi iras kontraŭ vi.

3. Alian grupon: anstataŭ, antaŭ, krom, post, kiuj povas postuli la uzon de la akuzativo objekta.

b) Oni povas kelkajn prepoziciojn verbigi aŭ prefiksigi.

Ekzemple: ĉirkaŭi = veni ĉirkaŭ ; antaŭi = esti antaŭ
superi = esti super ; eliri = iri el
enigi = fari, ke io iru en ion alian.

Klarigu: kontraŭi, subigi, eligi, anstataŭigi, preteriri, transsendi, perlabori, senigi, senhavulo, fortimigi, kunbatali, kunligi, aldoni, priparoli.

==**¤¤¤¤¤**==

*"Tagon tago sekvas, sed ne similas."*

*"Ĉiu mezuras laŭ sia metro."*

# LA ARTIKOLO "LA"

## 1. Difino

Artikolo estas senvaria vorto uzata antaŭ substantivo por precizigi ĝian difinitecon aŭ ne-difinitecon en pluraj lingvoj.

a) En Esperanto ekzistas nur la difinita artikolo. Ĝi estas **la**.
Ekzemple: La botelo, kiun vi donis al mi, reiros al vi.
Do, "**la**" montras, ke oni jam scias pri tiu botelo.

b) La ne-difinita artikolo tute ne ekzistas en Esperanto.
Do, kiam oni parolas pri io ne-difinita, tiam oni ne uzu la artikolon "**la**"
Ekzemple: Botelo staras sur la tablo. Lernanto venas.

En la lingvoj, kiuj havas ne-difinitajn artikolojn, oni tendencas ilin traduki per **IU, IA, UNU**. "**IU**" rilatas al konsidero de unu afero inter aliaj. "**IA**" rilatas al naturo (kvalito, stato) aŭ speco de unu afero inter aliaj kaj "**UNU**" estas nur numeralo baza.
Do: Nek **UNU**, nek **IU**, nek **IA** povas redoni la nedifinitan artikolon, kiu havas en si samtempe la signifojn de tiuj ĉi tri vortetoj.
Ekzemple: Donu al mi kreton.
Do, temas pri iu kreto, ia kreto kaj unu(sola).

## 2. Uzo de la artikolo "la".

Oni uzas "**la**":

a) Por paroli pri afero(j) konata(j), pri kiu(j) oni jam scias.
Ekzemple: Mi manĝas la panon (kiun mi aĉetis; aŭ: kiu estas sur la tablo; aŭ: kiun vi intencas manĝi, ktp.)
La suno brilas (nia suno). Mi surmetas la jakon (...). Metu la manĝaĵon sur la tablon. (manĝaĵo ĵus pretigita - nia manĝotablo kutima).

Vi deziras lerni Esperanton; ĉu vi jam kontaktis kun la instruisto? (Oni povas kompreni, ke temas pri la Esperanta instruisto).

b) Kiam temas pri unu ekzemplero reprezentanta tutan specon aŭ specion.
Ekzemple: La homo devas koni sin mem.
En Afriko la hundo ne havas propran dometon.
Mi ŝatas la abelon, ĉar ĝi produktas mielon.

c) Antaŭ la pronomoj posedaj uzataj memstare.
Ekzemple: Kie estas via frato? La mia nun dormas.
Kiom bela estas via filino! La lia estas aĉa.

Rim.:

1. La artikolo ne devas esti uzata

a) Apud **AMBAŬ, ĈIUJ** kaj **KIES**
Ekzemple: La du homoj manĝas = Ambaŭ homoj manĝas.
Ĉu la lernantoj estas atentaj? Jes! Ĉiuj lernantoj estas atentaj.
La piedoj de la tablo, kiun mi aĉetis, estas rompitaj = Mi aĉetis la tablon, kies piedoj estas rompitaj.

b) Antaŭ **Esperanto**, antaŭ land- kaj urb-nomoj, antaŭ propraj nomoj kaj titoloj.
Ekzemple: Esperanto estas logika lingvo.
Togolando estas lando de okcidenta Afriko.
KOROGO estas urbo en Eburbordo.
MONO estas rivero en Togolando.
Kio estas EVERESTO?
KOĜO estas lerta lernanto.
Sinjoro KOFI estas afabla.
Doktoro GAGLO estas fama.
SED oni devas uzi "**la**", kiam staras epiteto antaŭ kaj post tiuj nomoj.
Ekzemple: La lingvo Esperanto. La helpanta Esperanto.
La koketa Togolando. La lando TOGOLANDO.
La urbo KOROGO. La bela KOROGO.

La rivero MONO. La longa MONO.
La lernanto KOĜO. La lerta KOĜO.
La afabla sinjoro KOFI.
La fama doktoro GAGLO.
La Maro Ruĝa. La Monto Blanka.

c) Kiam oni dubas pri ĝia uzo, ĉar "**la**" montras kun certeco, ke oni scias pri la afero(j) konsiderata(j).
Ni vidu: Kiam ni diras: "Mi posedas la libron", tiam oni demandos pri kia aŭ kiu libro temas. Sed "Mi posedas libron" estas memkomprenebla, ĉar temas pri ne-difinita libro.

2. Kiam prepozicio finiĝanta per vokalo antaŭas la artikolon, tiam oni povas ĝin apostrofigi.
Ekzemple: La ecoj de l'homoj. Li iras tra l' koridoro.
Sed: Tiu apostrofa artikolo oftas nur en beletra medio. Ĝi ne estas tiom konsilinda.

==********=

*"Kiu faras ĉiam kion li intencas (volas),*
*tiu faras malofte kion li devas."*
G.K.

*"Pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo."*

# ADVERBOJ

Adverbo estas senvaria vorto, kiu esprimas tempon, lokon, manieron, gradon aŭ mezuron.

1. Adverboj formataj per aldono de la finaĵo "**e**" al radiko vorta

Ekzemple: Mi mult**e** kantos (mezuro). Mi estas hejm**e**. (loko). Tien mi iros lund**e**. (tempo)

2. Korelativ-adverbo

La bazaj estas la ne-difinitaj **IAL** (kaŭzo), **IAM** (tempo), **IEL** (maniero), **IOM** (mezuro, grado), **IE** (loko). Per aldono de **T**, **K**, **Ĉ** kaj **NEN** je la komenco de iu el ili, oni formas alian adverbon.

Ekzemple: T - iam = tiam  ĉ - iel = ĉiel.

**EKZERCO** : Listigu la aliajn!

Klarigoj pri la uzado

**T** montras.
Ekzemple: Tiam = En (aŭ dum) tiu tempo.
Tiom = tiu grado, tiu mezuro, tiu kvanto.

**K** demandas, respondas aŭ klarigas.
Ekzemple: Kiam = Dum (aŭ en) kiu tempo?
Kiel = laŭ kiu maniero?
Li iras tien, kie ŝi sidas.

**Ĉ** estas kolektiva.
Ekzemple: Ĉial = pro ĉiaj kaŭzoj. Ĉie = en ĉiuj lokoj.

**NEN** estas negativa.
Ekzemple: Neniam = dum (aŭ en) neniu tempo.
Neniom = neniu mezuro.

Notindas, ke oni foje uzas ankaŭ **ALI-**, **KELK-** .

**ALI** montras malsamecon.
Ekzemple: Aliiel = alimaniere. Aliiom = alia kvanto.

**KELK** signifas "ne-multaj".
Ekzemple: Kelkiom = nemulta kvanto, iom.
Kelkiam = dum kelkaj tempoj.

**EKZERCO** : Klarigu ĉiun el tiuj adverboj kaj uzu ilin en frazoj.

3. Adverboj, kies finaĵo estas "**aŭ**"

a) Tempaj

**ANKORAŬ** signifas

- ĝis nun, daŭre, plian fojon.
Ekzemple: Li ankoraŭ dormas.

- denove, ree, alifoje.
Ekzemple: Manĝinte, KOFI dormis. Kiam li ankoraŭ manĝos, donu al li orangôjn.

Rim.: ANKORAŬ ĉiam staras antaŭ la nea vorto.
Ekzemple: Mi ankoraŭ ne manĝas (ĝis nun mi ne manĝas)
Tamen oni povas uzi "ankoraŭ" post la nea vorto, kiam ĝi havas la sencon "ne denove", "ne ree".
Ekzemple: Mi ne ankoraŭ saltos (mi jam saltis, sed ne ripetos la saltadon).

**BALDAŬ** signifas "post mallonga tempo"
Ekzemple: Mi venos baldaŭ. Li venos pli baldaŭ ol vi.
Lia baldaŭa veno mirigas min.

**HIERAŬ - MORGAŬ - HODIAŬ** :

Hieraŭ mi estis en la hotelo PACO. Hodiaŭ mi estas sur la placo AMIKECO. Morgaŭ mi iros en la kulturan centron SOLIDARECO.
Oni povas tiujn vortojn uzi en la senco de ANTAŬTEMPE (hieraŭ), NUNTEMPE (hodiaŭ), ESTONTE kaj VENONTTEMPE (morgaŭ).
Ekzemple: Vi scias vian hieraŭon, sed ne vian morgaŭon, eĉ vian hodiaŭon.

b) Manieraj

**ADIAŬ** montras, ke oni foriras por longa tempo aŭ por ĉiam, for de iu, kiun oni salutas.

Ekzemple: Mi diris adiaŭ al miaj finnaj gepatroj.

Oni povas ĝin adjektivigi, substantivigi kaj verbigi.

Ekzemple: Via adiaŭo estas malĝoja.
Vi triste adiaŭis min.
Via adiaŭa rido estas trista.

**ALMENAŬ** signifas "ne malpli ol".

Ekzemple: En via klubo almenaŭ vi nin invitos (Oni estas certa, ke "vi" invitos, kaj eble ankaŭ aliaj povos).
Mi havas almenaŭ 100 F (la enhavo de mia monujo egalas aŭ superas 100 frankojn, sed certe ne malsuperas).

Komparu: Almenaŭ du viroj trinkas vinon. (1)
Almenaŭ vinon trinkas du viroj. (2)

En (1) oni povas kompreni, ke la nombro de la vintrinkantoj povas superi du, dum la malo ne povas esti.
En (2) montriĝas, ke ambaŭ viroj trinkas certe vinon, kaj povas esti, ke ili prenas aliajn trinkaĵojn (bieron aŭ brandon, aŭ ratafion...)
Do, notindas, ke ALMENAŬ ĉiam staras antaŭ la vorto, al kiu ĝi rilatas.

**ANKAŬ** signifas

- kaj plie

  Ekzemple: Mi manĝis, ankaŭ trinkis.

- same, egale kiel aliaj.

  Ekzemple: Ankaŭ mi instruas Esperanton.

Notindas, ke ANKAŬ ĉiam staras senpere antaŭ la vorto, al kiu ĝi rilatas.
Komparu: Ankaŭ mi manĝas. Mi ankaŭ manĝas.
Klarigu la diferencon inter la du frazoj.

**PRESKAŬ** signifas "ne tute, sed proksimume" (ĉirkaŭ)

Ekzemple: Li estas preskaŭ 50-jara.
Mi perdis preskaŭ 1 000 frankojn.

Oni povas ĝin:
- substantivigi: la preskaŭo de lia aĝo estas 50.
- verbigi: Lia aĝo preskaŭas la kvindekon.
- adjektivigi: Lia preskaŭa aĝo mirigas min.

**APENAŬ** signifas

- ne pli multe ol, ne tute tiom
  Ekzemple: Mi dormis apenaŭ du horojn. (Tio signifas, ke la daŭro de mia dormado estas ne du horoj, sed malpli).

  Rim.:
  En tiu senco APENAŬ estas preskaŭ MAL-ALMENAŬ.
  La sola diferenco estas, ke:
  - Malalmenaŭ (maksimume) 10 libroj = 10, 9, 8, .... 0 libro(j).
  - Apenaŭ 10 libroj = 9, 8, 7, .... 0 libro(j).

- preskaŭ ne, sed tamen iomete Jes.
  Ekzemple: Li apenaŭ manĝas.

- tute ĵuse, tuj post kiam, preskaŭ samtempe.
  Ekzemple: Apenaŭ li manĝis, lia frato alvenis.
  (En tiu senco APENAŬ rolas kiel subjunkcio).

Notindas, ke APENAŬ estas:
- verbigebla: lia aĝo apenaŭas 40 jarojn.
- substantivigebla: la apenaŭo de lia aĝo estas 40 jaroj.
- adjektivigebla: lia apenaŭa aĝo estas 40 jaroj.
  Lia apenaŭa lernado malsukcesigas lin.

**KVAZAŬ** signifas

- proksimume tiamaniere, laŭŝajne.
  Ekzemple: Li kvazaŭ lernas. Ĝi estas por mi kvazaŭ matena preĝo.

Averto pri la manieraj adverboj
Por doni pli da klareco al la frazoj, konsilindas ĉiam loki tiujn adverbojn senpere antaŭ la vortojn, kiujn ili precizigas.

Ekzemple: Ankaŭ li faras erarojn.
Li faras ankaŭ erarojn.
Unue mi skribas leteron.
Mi skribas unue leteron.
Respondu: Ĉu ekzistas diferenco inter ambaŭ frazoj de la duopo? Pravigu la respondon!

### 4. Unusilabaj adverboj

a) Lokaj

**ĈI** indikas proksimecon.

Ekzemple: Ĉi tiu libro (tiu proksima, kiun mi montras kontraste kun tiu, kiu estas malproksime)
Venu tien ĉi (apud mi).
Ĉi tiu semajno = la kuranta semajno.
ĉi tiom = tiu ĉi kvanto = en tiu ci kvanto.

**FOR** indikas malaperon, malproksimecon.

Ekzemple: Iru for! Miaj doloroj jam estis for.
Oni ĝin uzas:
- adjektive: La foraj landoj.
- prefikse: foresti, forigi, foriri, ktp.
- cetere: Mi iras foren.

b) Tempaj

**JAM** montras, ke io okaz-is, as, aŭ os antaŭ ol oni ĝin konsideras.
Ekzemple: Li jam manĝis. Jam de tri tagoj pluvas.

Rim.:
a) Jam de tri tagoj.... Tie oni povas anstataŭigi "**de**" per la akuzativigo de la vorto, kiun ĝi precizigas.
Ekzemple: Jam de tri tagoj = Jam tri tagojn.
b) **NE JAM = ANKORAŬ NE**
Sed **JAM NE** havas tute alian signifon:
"Mi jam ne manĝas" signifas, ke "Mi deziris manĝi, sed nun rezignas."

**ĴUS** signifas "Momento antaŭ nun", "antaŭ tiam"
Ekzemple: Li ĵus flatis la fratinon. Li ploris ĵus kiam vi ekiris. Lia ĵusa plorado ridigis min.

**NUN** signifas

- ĝuste en la momento, kiam oni parolas.
  Ekzemple: Li nun ekdormas.

- epokon, kiu estas.
  Ekzemple: Nun la junuloj havas barbon.
  La nunaj lernantoj dorlotiĝas.

**PLU** montras daŭradon kaj neĉes(ig)on de iu ago.
Ekzemple: Mi amas vin plu (daŭre vin amas mi).
Mi ne kantas plu (ne plu kantas).
Li ne plu lernas Esperanton (li ĉiam ne volas lerni...)
Klarigu: Ĉu estas diferenco inter JAM NE kaj NE PLU?

**TUJ** signifas **SENPROKRASTE.**
Ekzemple: Li tuj manĝos. Mi informis lin tuj post la ricevo de la letero. Lia tuja respondo estas bona.
Rim.: Foje oni povas duobligi ĝin por urĝi iun.
Ekzemple: Tuj tuj venu!

c) Manieraj

**AJN** indikas, ke oni havas aŭ postulas nenian preferon, ŝaton. Ĝin oni uzas kune kun korelativo.
Ekzemple: Venu iam ajn! Kion ajn vi donos, tion mi prenos.
Notu la adjektivan formon: Ajna libro = ia ajn libro.

**EĈ** signifas

- ne nur, sed pli ol kion oni povas atendi.
  Ekzemple: Li ĉiam promenas, eĉ en pluvo.

- se krome (krom tio)
  Ekzemple: Li lude perdis ne nur la domon, sed eĉ la sanon.

**JA** estas uzata por plifortigi aserton, akcenti, emfazi la realecon de ideo.

Ekzemple: La lernantoj ja krias.

Rim.: **JA** utilas ankaŭ por konsciigi, atentigi, memorigi pri io konata.

Ekzemple: Vi ja scias, ke Esperanto estas lingvo vivanta.

**JEN** estas uzata por montri ion, pri kio oni atentigas. Ĝi ankaŭ prezentas pli vigle ian subitan okazaĵon.

Ekzemple: Jen la mono. Jen li estas.
Krak! Jen la tablo rompiĝas.

Rim.:

a) **JEN.... JEN** signifas "ĉi-foje, alifoje".

Ekzemple: Jen li krias, jen li silentas.

b) Oni povas aliforme uzi **JEN**

Ekzemple: Jeni = esti la jena ; jena = sekva(nta).
jene = kiel tiuj, kiuj sekvos (aŭ: tio, kio sekvas). La jeno = kio sekvas.

**NE** estas la malo de **JES**. **JES** estas uzata por montri konsenton, aprobon, k.s.

Ekzemple: Ĉu vi estas Esperantisto? Jes! Mi estas.
Ne! Mi ne jam estas.

Noto pri JA kaj JES

Ĉu vi estas Esperantisto? Jes! (1)
Ĉu vi ne estas Esperantisto? Jes ja! aŭ: Tamen jes! (2)
Klarigu la diferencon inter la respondoj (1) kaj (2).

Klarigu la diferencojn inter la tri jenaj frazoj:
Ne mi manĝas. Mi ne manĝas. Ne, mi manĝas.

Oni povas aliforme uzi **NE**:

- nea = nega = negativa.

- Nei = negi = diri ne.

Analoge, **JESI** kaj JESA estas uzeblaj, ankaŭ **JESE**.

Rim.: Memoru la lokon de "**eĉ**" kaj "**ne**" en la frazo:
Ili estas senpere lokitaj antaŭ la vorto, kiun ili alrilatas.

**MEM** signifas "per propraj volo, forto, kapablo, decido, k.s."
Ekzemple: Mi manĝas mem. Mi kantos mem.

Ĝi estas prefikse uzata en la refleksiva senco.
Ekzemple: Memamo = sinamo. Memmortigi = Sin mortigi

**TRE** signifas "**EGE**", "en la plej alta grado"
Ekzemple: TOTO tre amas min.
Oni povas ĝin emfazi per **TERURE** (aŭ: strange, eksternorme, eksterordinare, treege, ktp).
Ekzemple: Li estas terure aĝa. Ŝi fariĝas eksternorme dika. Li lernas treege malrapide.
Multaj religianoj estas strange fanatikaj.

b) Kvantaj, gradaj, aŭ mezuraj.

**NUR** signifas

- ne pli ol

Ekzemple: Nur li studas. (Ne ekzistas alia(j) studanto(j) ol li). Li alvenis nur je la oka.
Kelkiam oni povas ĝin anstataŭigi per **SOLE**.
Ekzemple: Sole mi kantas = Nur mi kantas.
Rim.: **NUR** ĉiam staras senpere antaŭ la vorto, kiun ĝi akcentas.

**PLI** montras aldonon.
Ekzemple: La lernantoj prenas pli da libroj.

Oni povas uzi ĝin aliforme:
- adjektive: plia = aldona, suplementa.
- adverbe: plie = aldone.

Rim.: Komparu **PLI** kaj **PLU**!
Ĝenerale, ili ne havas saman sencon.

Tasko: Faru frazojn por klarigi la ĉi-supran aserton pri **PLU** kaj **PLI**.

**TRO** signifas "pli ol tio(n), kion oni konsideras, ŝatas, aprezas, ktp."
Ekzemple: Li tro parolas.
Ĝin oni povas aliforme uzi:
- verbe: troi = fari tro.
- adjektive: troa = superflua.
- substantive: troo = senutila aldono, eksceso.

Poemeto: **IAM**

Iam mi trovos.
Mi ne haltos, eĉ ne rapidos.
Pacienca mi estu!
Ĉar sonorilo ĝustatempe sonas.
    Certpaŝe mi iros.
    Mi ne hontos, nek timos.
    Realisma mi iĝu!
    Ĉar la vivo estas tia, kian ni vivas.
  Mi ne pensas plu pri la estinteco.
  La ne-atenditaĵoj jam mortis.
  Reciproke, ne-atendotaĵoj naskiĝos.
  Estis malrido; estos rido.
    La estonteco estos ĉiam pli feliĉiga.
    Ĉio mia, eĉ malfrua, ĉio bona.
    Unu perdiĝis, du pli bonaj akiriĝos.
    Pacienco necesas, ĉio en ordo estos.

==⁂⁂⁂==

*"Tolaĵon malpuran lavu en domo."*

*"Se mi scius kien mi falos,
tien mi metus tapiŝon."*

# KONJUNKCIOJ kaj SUBJUNKCIOJ

## 1. Konjunkcioj

Konjunkcio estas vorteto, kiu kunigas vortojn, propoziciojn, ktp. La ĉefaj estas: **aŭ**, **ĉar**, **do**, **kaj**, **nek**, **sed**, **tamen**.

**AŬ** estas uzata por montri du aŭ plurajn situaciojn, el kiuj kelkaj estos konsiderataj. Do, temas pri elekto.

Ekzemple: Mi iros en nian vilaĝon, aŭ restos en la urbo.
Li kantis aŭ parolis.

**ĈAR** montras klarigon aŭ motivigon de antaŭa propozicio.

Ekzemple: Mi sidas, ĉar mi estas laca.
Li estas mia nepo, ĉar lia patro estas mia filo.

**DO** montras:

- sekvon, konkludon.
  Ekzemple: Li eniras la kafejon, do la pordo estas tiam malfermita.
- surprizon, indignon, riproĉon.
  Ekzemple: Kiel do la kasisto de via klubo povus de si mem elspezi la monon de la grupo!
- insiston.
  Ekzemple: Li manĝu do! Prenu do la kajerojn!

**KAJ** signifas "aldone, plie".

Ekzemple: Ili studas kaj babilas. Du kaj naŭ estas dek unu.

**NEK** signifas "kaj ne".

Ekzemple: Li ne kantas, nek babilas.

Rim.: Oni uzu **NEK** nur post negativa membro de frazo; oni ne uzu ĝin ankaŭ post "sen".

Ekzemple: Li marŝas sen paroli kaj aŭdi.
Estus erare skribi: "Li marŝas sen paroli nek aŭdi."

**SED** montras

- malsamecon inter la kunligitaj aferoj.

  Ekzemple : Li ne dormas, sed lernas.
  Ne vi iros tien, sed via frato.

- transiron de ideo al alia.

  Ekzemple: Ni jam havas niajn rajtojn; sed nun kion ni faru plu?

Rim.: Post "**kvankam**" oni uzas en la ĉefpropozicio, ne "**sed**"; sed "**tamen**".

Ekzemple: Kvankam li estas ne-Esperantisto, tamen li partoprenas la Esperanto-kongreson de via lando.

**TAMEN** montras kontraŭecon, kontraŭstaron, k.s. Ĝi signifas "**malgraŭ tio**".

Ekzemple: Li ne estas multe riĉa, tamen havas proprajn domon kaj aŭtojn.
Ĉu vi ne estas Esperantisto? Tamen jes!

**ALIAJ KONJUNKCIOJ**. Ili estas duopaj:

**jen... jen** ; **aŭ... aŭ** ; **ĉu... ĉu** ; **nek... nek** ; **kaj... kaj** ; **ne nur... sed ankaŭ** ; **ju... des** (sekvendaj de **pli** aŭ/kaj **malpli**)

**AŬ... AŬ** montras konsideron de unu afero inter nur du, kiuj eblas.

Ekzemple: Aŭ venki, aŭ morti. Aŭ li kantos, aŭ li ŝarados.

**ĈU... ĈU** esprimas dubon en du paralelaj esprimoj.

Ekzemple: Li vizitos nin, ĉu dimanĉe, ĉu lunde.
Li tien iris ĉu por studi, ĉu por labori.

**ĈU... AŬ** esprimas duoblan demandon, dubon.

Ekzemple: Ĉu li malsatas aŭ malsanas?
Ĉu esti aŭ ne esti?

**KAJ... KAJ** montras, ke ĉiuj kunligitaj aferoj estas konsiderataj.

Ekzemple: Kaj li kaj liaj fratoj mortis pro la akcidento.
Li lavas kaj pantalonojn kaj ĉemizojn.

Komparu la ĉi-sekvan ekzemplon kun la sekva frazo:
"Li lavas tiel pantalonojn, kiel ĉemizojn."
Notindas, ke oni povas uzi **KAJ...KAJ** en la senco de **TIEL ... KIEL**

**NEK... NEK** montras, ke neniu el ĉiuj aferoj estas konsiderataj.
Ekzemple: Nek vi, nek mi iru tien.
Rim.: Oni uzas en la sama senco ankaŭ "**ne... nek**"
Ekzemple: Ne vi iru tien, nek ŝi.
Mi lavas nek ĉemizojn nek laĉojn.
Mi lavas ne ĉemizojn nek laĉojn.

**NE NUR... SED ANKAŬ** montras, ke kiel la antaŭa situacio, tiel la sekva estas same konsiderata.
Ekzemple: Li ne nur studas, sed ankaŭ instruas.
Ne nur vi, sed ankaŭ aliaj venos.

**JU... DES** montras, ke unu el la konsiderataj aferoj dependas de la alia.
Ekzemple: Ju pli mi dormas, des pli mi ripozas.
Ju pli mi kantas, des pli mi soifas.
Ju malpli li lernas, des pli li diboĉas.
Ju malpli li ludas, des malpli li malsatas.

## 2. Subjunkcioj

Subjunkcio estas vorto, kiu ligas subordigitan propozicion (subpropozicion) al la ĉefpropozicio. La ĉefaj estas:
**ĉar, dum, ĝis, ke, kvankam, kvazaŭ, se.**
Ekzemple: Mi krios, ĝis vi aŭdos.
Mi ne venis, ĉar mi malsanis.

**DUM** signifas

- en la sama tempdaŭro kiel.
Ekzemple: Li manĝis, dum vi legis.

- kontraŭe, kontraste.
Ekzemple: Li babilis, dum ŝi silentis.
Li jubilas, dum mi priploras mian malsukceson.

**KE** enkondukas kompletigajn propoziciojn.

Ekzemple: Mi scias, ke vi venos.
Estas menciite, ke vi ĉeestis la kunvenon.
Mi ĝojas, ke vi povas viziti nin.

ATENTU: ne uzu "**ke**", kiam oni devas uzi "**kiam**", "**ĝis**", "**dum**", "**ol**", "**k**-korelativojn".

Ekzemple: Mi estas pli dika **ol** vi.
Li ploras ĉiufoje, **kiam** pluvas.
La libro, **kiun** mi aĉetis, estas verda.
Mi manĝos tiom, **kiom** vi preparos.

**KVANKAM** montras, ke, kio ne devus okazi, tio tamen estiĝas (-is, -os).

Ekzemple: Li povis veni, kvankam pluvis.
Li manĝis viandon, kvankam li diris sin vegetarano.

**KVAZAŬ** signifas "**kiel se**".

Ekzemple: Li trinkas, kvazaŭ li estus funelo.
Lia parolo fluas, kvazaŭ li scipovus la lingvon.

Rim.:

a) Post "**kvazaŭ**" oni devas uzi la kondicionalon, ĉar "**kiel "se**" indikas supozon, ne-eston.

b) Kelkiam la verbo en la subpropozicio povas esti en formo participa.

Ekzemple: Li trinkas kvazaŭ estante funelo.
Lia parolo fluis, kvazaŭ estante senerara.

Tamen oni povas simple skribi "Li trinkas kvazaŭ funelo."

**EKZERCO** : Klarigu la jenajn frazojn:

a) Li konsideras lin kvazaŭ reĝo.
b) Li konsideras lin kvazaŭ reĝon.

**SE** signifas

- en la okazo, ke.

Ekzemple: Se mankos pano, li ne venos.
Se vi havos tempon, vi vizitos nin.

- kondiĉe, ke.

Ekzemple: Se mi volus, mi povus.

Rim.: La verboj en la ĉefa kaj subordigita propozicioj estas en la sama tenso.

**ANEKDOTO:**

## ŜTELISTO

AKADA estas lerta kaj sperta ŝtelisto kaj rabisto. Ne ekzistas en lia lando prizono, kiun li neniam vizitis. Li estas famkonata de ĉiuj. Iam, tuj post kiam oni lin reliberigis, li bedaŭris sian foriron, kion li esprimis per konversacio, kiun li havis kun la provosoj.

- Ĝis revido, sed ne adiaŭ! karaj provosoj. Ni baldaŭ renkontiĝos, ĉar tiu ĉi ejo ege plaĉas al mi, mi ĉiam en ĝi vivadu.
- Ĉu vi volas ĉiam resti en tiu ĉi malpura kaj suferiga ejo?
- Kiu instruis al vi, ke ĝi estas suferiga kaj malpura? Certe, vi gardistoj suferas, ĉar ĉiam vi staras apud la enirejo, kiam ni ludas kun plezurego interne de la malliberejo. Ĉu vi ne aŭdas niajn kriojn? Ni ĉiam kantas nian ĝojegon. Mi bedaŭras, ke mi forlasas hodiaŭ tiun ĉi liberejon por eniri mian veran malliberejon.
- Viaj diroj mirigas nin. Kio estas via vera malliberejo? Ni demandas vin pri tio, ĉar vi diris, ke tiu ĉi ejo estas via liberejo.
- Ĉu vi havas edzinon, gefilojn? Vi devas koni la veran malliberejon. Mia domo kune kun la domanoj, miaj familianoj kaj parencoj, konsistigas la veran malliberejon. Mi neniam estas tie libera; ĉiutage miaj gefiloj krias kaj kriaĉas: "Paĉjo, mi malsatas", miaj edzinoj ĵaluzas unu la alian, sin batas. Tiam, mi devas ĉiam paroli por konsoli, juĝi, puni, labori por sukcesi satigi la bubojn. Ho! Se mi estus for de ili, mi grasiĝus. Ĉes! al tia vivado en mia domo, kaj sukceson al ŝtelado. Mi ne tion ŝatas; mi volas esti kaj resti libera. Tial, mi preferas resti en ejo, kie mi ne spertos plu miadomajn okazaĵojn.

  Mi nun promesas al vi, ke postmorgaŭ mi revenos tien ĉi por pluĝui la liberon de tiu ĉi domo. Karaj provosoj, mi petas vin, bonvolu diri al viaj kamaradoj, policanoj, ke ĉi-nokte mi aktivos en la butiko KIRIKIRI, ĝuste apud la urbodomo. Ili venu tien por min aresti, mi tie havigos enirbileton, por ke mi revenu en tiun ĉi prizonon. Ĝis revideto!

==≠≠≠≠≠==

*"Se ne estus "**se**" kaj "**tamen**", al ĉio mi dirus "AMEN" "*

*"Kio frapas al vi la fenestreton,*
*tio al alia frapas la pordegon."* G.K.

# KORELATIVOJ

La bazaj korelativoj estas: **ia, ial, iam, ie, iel, ies, iom, io, iu.**

1. Klarigoj pri ilia uzado

**IA** montras, ke la speco (aŭ la kvalito, aŭ la naturo) de la objekto, al kiu ĝi rilatas, estas ne-difinita.
Ekzemple: Ia libro (ĉu nova? ĉu matematika? ĉu...?)

**IAL IE IEL IOM IAM** (vidu "Adverboj")

**IES** montras, ke la posedanto de la objekto, al kiu ĝi rilatas, estas ne-difinita.
Ekzemple: Ies libro kuŝas sur la tablo. (Oni ne konas aŭ ne nomas la posedanton de la libro).

**IO** signifas "ne-difinita objekto".
Ekzemple: Io estas sur via dekstra okulo.
Mi ion trinkis.

**IU** montras, ke la objekto, al kiu ĝi rilatas, estas inter aliaj konsiderata aparte, individue.
Ekzemple: Iu libro falis. (kompare kun aliaj, kiuj ne falis)
Mi vidas iun skribilon.
Iuj kantoj plaĉas al mi.

Rim.:
a) Estas diferenco inter **IU** kaj **IA**. Klarigu tion!
b) Iu persono falis. Iu besto falis. Iu kreto falis.
En la unua frazo, oni povas forigi la vorton "persono": "Iu falis". Do, en tiaj sendependaj propozicioj, oni povas forigi la vorton, al kiu "**IU**" rilatas, nur kiam tiu vorto temas pri persono, aŭ se la kategorio estas antaŭe nomita aŭ klara el la kunteksto.
Ekzemple: Iu homo venis = Iu venis.
Mi vidis multajn aŭtojn; iuj estas novaj.

c) **IA, IO, IU, IE** estas fleksiaj (variigeblaj), sed **IO** kaj **IE** oni ne rajtas enpluraligi.

Ekzemple: Mi iris ien, kaj vidis ion.
Iuj homoj vidis iajn bestojn.
Ie en la kamparo io ŝajnas stranga.

2. Aliaj korelativoj

Per aldono de **T, K, Ĉ, NEN, ALI** kaj **KELK** al la ne-difinitaj oni formas aliajn korelativojn.

Tasko: Vidu "Adverboj"

1. Starigu tabelon por la korelativoj.
2. Klarigu la uzadon de tiuj, kiuj komenciĝas per **T, K, Ĉ, NEN, ALI** kaj **KELK**.

3. Korelativeco

Tiuj vortetoj ofte iras duope:
- **Kiu** iras kun **iu** (kaj kun la derivaĵoj de **iu**)
- **Kia** iras kun **ia** (aŭ ĝiaj derivaĵoj)
- **Kiam** iras kun **iam** ( ,, )
- **Kiom** ,, ,, **iom** ( ,, )
- **Kiel** ,, ,, **iel** ( ,, )
- **Kio** ,, ,, **io** ( ,, )
- **Kies** ,, ,, **ies** ( ,, )
- **Kie** ,, ,, **ie** ( ,, )

Ekzemple: Kie mi estas, tie mi restos.

Kies libro estas apud mi, ties kajeron mi prenis.

Li parolas tiel, kiel nia klubestro.

Averto: Se unu el la duopo estas en la pluralo, ankaŭ la dua devas tia esti (sed ne ĉiam en la kategorio "**ia**"). Tamen la akuzativeco de unu ne implicas tiun de la alia.

Ekzemple: Mi vidis tiun, kiu venis.
La lernanto estas ĝuste tiu, kiu babilis.
Ili estas tiaj, kia la patro.

Pluekzercu:

a) Faru pliajn frazojn kun **IES** kaj ĝiaj derivaĵoj.

b) Diferencigu **TIOM** de **TIEL**.

-=-=-=-=-=-

Cerbumaĵo:

En iu vilaĝo mortis du patroj kaj du filoj. Pro tiu malapero de homoj la nombro de la loĝantoj de tiu vilaĝo do malpliiĝis de tri.

Demonstru, ke tiu kalkulo " 2 + 2 = 3 " estas ĝusta.

==========

*"Kie burĝonas Kruco, tie ĝermas Pasko."*

G.K.

# aldonaĵoj

# INTERJEKCIOJ

Interjekcio estas ekkria vorto, kiu esprimas subitan movon de la animo.

1. En ĉiu mondparto ekzistas interjekcioj formataj

   a) aŭ de bruo, kiun faras la ago okazigita. (Tiuj interjekcioj estas nomataj onomatopeoj.

   Ekzemple: Siiii... : montras pisadon (por infanoj), fluon de likvaĵo.
   Si : por altiri atenton.
   Glu : por instigi al glutado.
   Krak! : montras romp(iĝ)on.
   Pum! : Por falo.

   b) aŭ de la silabo de la vorto esprimanta la agon.
   Puŝ-ŝ! : instigo al ŝovado de boato sur akvon.
   Halt! : Signalo por haltigi.
   Rap! : Signalo por rapidigi.

2. Aliaj interjekcioj

   a) alvokaj: He! Ho! Halo! (telefono)
   b) forpelaj : For! (For de ĉi tie)
   c) instigaj:
   Por aktoron aprobi kaj instigi al ripeto: Bis!
   Por silentigi: Ŝi! aŭ ĉit!
   Por haltigi: Halt! (por homoj) Stop! (por maŝinoj)
   Por atentigi pri danĝero: Hej!
   Por peti helpon: Help! Ŝtel! (pro ŝtelisto), Fajr! (pro fajro, incendio)
   Por ekag(ig)i: Ek!
   Por saltigi: Hop!
   ĉ) Sentesprimaj:
   Subita doloro: Aj! Huj! Aŭ!
   Sufero: Ah! Aŭ! Oj! Ve!
   Ekmiro: Ha!
   Aserto: Ho jes! Ja! Sed jes!
   Rido: Haho!
   Malŝato: Pu! Fi! Aĉ!
   Timo: Hu!
   Ĝojo: Hura!
   Tre forta ekscito: Hu Ha!
   Faciliĝo, sendoloriĝo, malŝarĝiĝo: Uf!

# MEZURUNUOJ

1. Pri longo

   Metro: **m** ; milimetro; kilometro ; ktp.
   Mikrono (muo): μ ; Anstromo: Å
   1 m = 1 000 mm ; 1 mm = 1 000 μ ; 1 μ = 10 000 Å

2. Pri areo

   Kvadrata metro: $m^2$
   Kvadrata kilometro; kvadrata hektometro ....
   Aro : **a** ; Hektaro: **ha** ; 1 a = 100 centiaroj (**ca**)
   1 ca = 1 $m^2$ ; 1 ha = 100 a

3. Pri volumeno

   Kubmetro: $m^3$ ; kubcentimetro: $cm^3$
   Litro: **l** ; mililitro: **ml** ; 1 $dm^3$ = 1 l

4. Pri angulo

   Graduso (**gr**) ; Grado (°) ; Radiano (**rd**)
   La mezuro de orta angulo estas 90°, aŭ 100 gr aŭ $\pi/2$ rd
   Angulminuto (') ; angulsekundo ('') ; 1 gr = 54'

5. Pri masoj (aŭ pezoj)

   Gramo (**g**) ; kilogramo (**kg**) ; kvintalo (**q**) ; tuno (**t**)
   1 q = 100 kg ; 1 t = 10 q
   Atentu: Por la Angloj 1 kvintalo = 45 aŭ 50 kg.

6. Pri tempo

   Tago; horo (**h**) ; minuto (**mn**) ; sekundo (**s**) ; milisekundo;ktp.

7. Rapido

   Po X kilometro(j) en horo = X km/h ; Po X metro(j) en sekundo = X m/s
   Ekzemple: Trajno veturas po 200 km en horo (200 km/h)

8. Elfluokvanto

   Po X kubmetro(j) en horo : X $m^3$/h ; po X kubmetro(j) en sekundo: X $m^3$/s ; po X litro(j) en sekundo : X l/s

9. Forto

Neŭtono aŭ Nutono (**N**) ; dino (**d**), kilogramforto (**kgf** aŭ **kgp**) 1 kgp = 9,8 N ; 1 N = 10 000 d

10. Energio

Ĵulo (**J**) ; kiloĵulo ; kiloŭathoro (**kwh**) ; ŭathoro (**Wh**) ; kilogramometro (**kgm**) ; 1 kgm = 9,8 J : 1 Wh = 3 600 J

11. Varmo

Grado Celsius (**°C**) ; Grado Farenhejta (Fahrenheit) **°F**
0°C estas la temperaturo de fandiĝanta akvo, 100°C estas tiu de bolanta akvo. 0°C = 32°F ; 100°C = 212 °F

# UZO DE VORTAROJ

Ni uzas niajn vortarojn unu- aŭ dudirektajn por traduki, kaj Esperantan por trovi signifon de vorto, kiun ni ne komprenas.

Kiel ni devas uzi nian vortaron, por ke ni povu tiri rapidan kaj taŭgan profiton de nia laboraĵo? Mi klopodos rakonti pri propra sperto, kiun mi jam disponigas al miaj kunlernantoj.

1. Por traduki

Sciindas, ke la tradukado ne estas tiom facila, kiom oni povas imagi. Oni ne devas ĉiam anstataŭigi vorton Esperantan per responda vorto de la nacia lingvo, nek inverse. Tiu laŭvorta tradukado difektas la tekston, kaj neniu povas ion kompreni. Oni devas unue kompreni la kuntekston, antaŭ ol ektraduki. Se okazas, ke la konsultado de vortaroj necesas, tiam la vojo al ili restas malfermita.

a) Vortaro NL/Esperanto (NL = Nacia Lingvo)

La vortoj estas laŭalfabete listigitaj. Oni do facile tie trovas la bezonatan vorton kun responda traduko. Sed rekonindas, ke la unusola vorto en NL povas havi unu aŭ plurajn respondojn en Esperanto. Ĉu oni devas tuj preni la unusolan? Ĉu elekti tuj unu el la multaj? La ekzistado de unusola vorto responda ne garantias ĝian taŭgecon: ĉu tiu vorto estas Esperanta? Se jes, kion ĝi signifas en Esperanto? Tiam oni devas aliri al **Plena Vortaro de Esperanto** por certigi sin pri la senco. Oni povas eĉ flanke lasi tiun vorton, kaj fari frazon, kiu respondas la sencon bezonatan.

b) Vortaro Esperanto/NL

Oni faros kiel en (a). La sama vorto en Esperanto donas unu aŭ plurajn en NL. Kion fari? Konsulti plenan vortaron NL aŭ/kaj la unudirektan NL/Esperanto.

Tamen kelkaj baroj penigas la trovadon de la vortoj, ĉar, kvankam la vortoj en la Plena Vortaro de Esperanto kaj en la vortaro Esperanto/NL listiĝis laŭalfabete, oni ne povas facile tuj trovi, se antaŭe oni ne scias, ke en tiuj vortaroj

estas nur radikoj, kaj ne kunmetaĵoj. Kiel do konsulti tiajn vortarojn?

2. Plena Vortaro

Unue, oni devas scii pri la naturo de la serĉota vorto; ĉu ĝi estas kunmetaĵo? ĉu radiko+ finaĵo?

a) Radiko kun finaĵo

Oni serĉas la radikon de la vorto laŭ ĝia komenclitero. Se la radiko estas verba, aŭ substantiva, aŭ adjektiva, la vorton oni trovas kun la koncerna finaĵo.

b) Kunmetita vorto

Estas duspecaj kunmetaĵoj:

- Kunmetaĵo radiko/afikso (aŭ alia vorteto rolanta kiel afikso)

Oni serĉas la radikon en la vortaro. Kune kun tiu ĉi povas troviĝi la bezonata kunmetaĵo.
Ekzemple: PENINDA
Unue, oni serĉas PEN : oni trovas PENI (do radiko verba). Poste, sub PENI estas aliaj skribaĵoj. (Ekzemple: ~o ; ~iga, ktp.) ~ signifas PEN, do ~o = peno. Oni listigas la kunmetaĵojn ~X laŭ la alfabeta ordo de X. Do, sub PENI oni trovas ~inda (peninda), poste ~iga (peniga).
Rimarko: Kelkokaze oni trovas nur la radikon; do per tiu radiko oni povas kompreni la tutan kunmetaĵon, ĉar oni jam scias pri la afiksoj, prepozicioj k.s.

- Kunmetaĵo radiko/radiko

Oni devas unue memori la regulon de la kunmetado de vortoj. Serĉu ĉiun radikon: povas okazi, ke la kunmetaĵo troviĝas kun unu el la du radikoj. Alikaze, oni jam povas kompreni la signifon de la kunmetaĵo, ĉar jam tiun de ĉiu radiko.

AVERTO

- Sciindas, ke kelkaj vortaroj havas suplementojn (aldonaĵojn). Do, se oni ne trovas la vorton en la ĉefa parto, oni iru al la suplemento, kie ankaŭ la aldonaj vortoj laŭalfabete listiĝis.

- Ne estas facile iri de vortaro al vortaro. Konsultado de tiaj libroj rabas multan tempon. Oni devas preni sur sin la taskon komprenigi sian mesaĝon. Do, por eviti tiun tenton pri ne-prenado de la konsult-libroj, oni devas ĉiam havi ilin apud, ĉe, eĉ sur la skribtablo. Tiel la risko de konsulta neglektado grandskale malpliiĝas.
Do, komprenindas, ke oni devas ĉiam havi kun si ĉiajn konsultlibrojn, kiuj estos bezonataj, dum oni laboras.

==*******==

*"Servo postulas reservon."*

# ENHAVTABELO
(la ciferoj indikas la paĝojn)


Antaŭparoloj 3-8

I. REVIZIU

**UNUA LECIONO** 10
1. Alfabeto 10
2. Prononco 10
3. Artikolo 11

**DUA LECIONO** 13
1. Substantivo, verbo, adjektivo, adverbo 13
2. Personaj pronomoj 13
3. Posedaj adjektivoj 13
4. Posedaj pronomoj 14

**TRIA LECIONO** 15
1. Konjugacio 15
2. Demandaj frazoj 15
Poemeto: RIGARDUMO 18

**KVARA LECIONO** 19
1. Konjugacio (u-modo) 19
2. Akuzativo 19

**KVINA LECIONO** 22
1. Vortfarado en Esperanto 22
2. Ĉu vi memoras pri:
a) Gepatroj kaj Parencoj? 23
b) Homo kaj Viro? 23
c) Ankaŭ, Eĉ, Nur, Ne? 23

**SESA LECIONO** 25
1. Kunmetitaj vortoj 25
2. Rilativaj pronomoj aŭ rilativoj 26
3. Ĉu vi scias, ke
a) Aŭskulti kaj Aŭdi ne havas la saman signifon? 28
b) Rigardi kaj Aŭdi ne estas samsencaj? 28

**SEPA LECIONO** 29
1. Komparativoj 29
2. Uzo de ANTAŬ kaj ANTAŬ OL 30
3. Uzo de IG kaj IĜ 31

## OKA LECIONO 33


1. La akuzativo (daŭrigo) 33
2. Noto pri la uzo de "ĉiun trian horon" k.s. 36


## NAŬA LECIONO 37


1. Konjugacio (daŭrigo) 37
   a) La volitivo 37
   b) La kondicionalo 37
2. Superlativo 37
3. Memoru pri
   a) Aĵo 38
   b) Da ĝi ; Da ili 38
   c) Ĉu ; se ; tiel ; tiom 39
   ĉ) Ujo da ; Ujo de 39
   d) Ĉiuj 39
   e) Multaj / Multe da ; Kelkaj / Kelke da 39
   f) Ne plu ; Jam ne 40
   g) Ne jam ; Ankoraŭ ne 40
   ĝ) Devi / Rajti 40
   Poemeto: MI ĈIAM BEZONAS CIN 41


## DEKA LECIONO 42


1. Bazaj numeraloj 42
2. Uzo de la numeralo orda 43
3. Iom da matematiko 44
4. Ĉu vi memoras la anstataŭigon de DUM per la akuzativo? 48


## DEK-UNUA LECIONO 49


1. Transitiveco de verbo 49
2. Nepersonaj verboj 51
3. SI kaj SIA 51
4. Refleksiva verbo kaj responda iĝ-verbo 52
   Poemeto: SILENTO


## DEK-DUA LECIONO 54


1. Participo 54
   a) Aktivaj participoj 54
   b) Pasivaj participoj 55
   c) Participaj epitetoj 56
2. ĴUS / TUJ 58
3. EĈ / MEM 58
   Poemeto: KIEN MIA KOR'?

## II. STAMPU


Afiksoj 62
Prepozicioj 72
La artikolo "LA" 82
Adverboj 85
Poemeto: IAM 93
Konjunkcioj kaj Subjunkcioj 94
Anekdoto: Ŝtelisto 98
Korelativoj 99


## III. ALDONAĴOJ


Interjekcioj 104
Mezurunuoj 105
Uzo de vortaro 107


==+#####==

## *En la sama serio, por progresantoj:*

**Kvardek paŝetoj al plua posedo** (Unua legolibro, 80 paĝoj en A6-formato)

"Modeste, L. Lentaigne per la titolo lokas sin en la ombro de W. Auld. Cetere, la celo estas alia. W. Auld celas akiron de vasta legopovo kaj ĉefe detalan studadon de la tiklaj punktoj de la gramatiko. L. Lentaigne enkonduke indikas trioblan celon: li deziras krei legemon, alporti provizon da utilaj esprimoj, kaj veki inklinon al pensado en la Internacia Lingvo. Pedagogie li esperas, ke la uzantoj liberigos sin de la emo al tradukado, kaj de la laŭvorta tendenco. La 40 proponitaj tekstoj, kiuj estas proksimume 20-liniaj, estas tre diversaj laŭ la etoso, jen amuzaj, jen priskribaj, jen patosaj, sed ĉiam facile alireblaj.... Intence, la traduko (en la franca) estas konsultebla sur la dorsa flanko de paĝo..." (J.P. Beau, **SAT-Amikaro**, dec. 1991)

Aldone, eblas elekti kiel ekzemplojn de prononcado:
74-minutan kompaktdiskon por 36 tekstoj.

**Tradiciaj rakontoj** (kompilitaj kaj esp-igitaj de D. Castello), 43 paĝoj. Kun registraĵo de 50 el la rakontoj sur 74-minuta kompaktdisko. Parolas diversdevenaj geesperantistoj.

Al "komencantoj" ni konsilas: plurfoje aŭskultu mallongajn rakontojn antaŭ ol samtempe legi ilin. Poste provu mem rakonti, samtempe registrante vin. Komparu kaj persistu ĝis vi superos la surdiskajn ekzemplojn!

**Lingvaj anguloj** (F. Baronnet), 100 paĝoj).

La aŭtoro celas respondi al la plej ofte renkontitaj demandoj, kies respondoj konsistigas la ĝeneralan strukturon de nia lingvo. Li esperas utili al la kamaradoj, kiuj deziras bazi siajn praktikajn konojn de la lingvo sur gramatika fundamento, prepari porinstruajn ekzamenojn aŭ simple respondi al prilingvaj demandoj.

**Kiel diri...?** (LENTAIGNE), praktika Esperanta frazeologio, 5000 esprimoj, 160 paĝoj.
Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn, kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhofa stilo. Por tio ni provizas ilin per materialo relative abunda, en kiu ili trovos verŝajne la eblon solvi multajn problemojn. La esprimoj estas kliŝitaj dirmanieroj, sankciitaj de la uzado. Ili estas grupigitaj ĉirkaŭ 67 "ideoj" arbitre elektitaj, laŭ la gvidlinioj: asociado de la ideoj, ĉiufoje kiam eblis...
Plurfoje reeldonita (sume pli ol 5000 ekzempleroj...), tiu internacie uzebla lernilo ĝuas grandan sukceson.

**Ne tiel, sed tiel ĉi!** (F. Faulhaber), konsilaro pri stilo, 64 paĝoj.
Ni ĉiuj deziras havi facilan kaj elegantan stilon. Faulhaber, ano de la Akademio, bone kaj por ĉiuj kompreneble klarigas, kial certaj frazoj, kiujn li kolektis el tre diversaj eldonaĵoj, ne estas bonaj kaj kial la ekzemplo de li donata estas pli konsilinda. Kun granda ĝuo vi legos, komprenos, admiros kaj imitos. Tiel ankaŭ vi iom post iom fariĝos bona stilisto.

**Instrui Esperanton por komuniki** (C. Samain), 15 paĝoj.
Skizo pri la komunik-situacia instrumetodo: "Kial ne, jam de la komenco, lerni la lingvon en rilato kun ĝia reala uzo? Kial ne bazi la instruadon sur komunikaj situacioj kaj tiel igi la lernadon de frazoj, esprimoj, vortoj, gramatiko, pli stimula kaj tuj utiligebla?..."

*kaj multaj aliaj broŝuroj: prilingvaj, literaturaj, sociologiaj, filozofiaj, psikologiaj, ktp...*
*Petu katalogeton de la plu disponeblaj titoloj kaj specimenon de " **Laŭte!**", nia dumonata liberesprimilo por progresemuloj.*
"**Laŭte!**" celas plejeble favori liberan esprimadon de ĉiuj siaj abonantoj pri ĉiuj temoj, sen tabuo kaj sen cenzuro; kaj favori ankaŭ rektajn interrilatojn inter ili. Ni ligu nian scipovon de interpopola lingvo al la ĉiutaga vivo, kun la ĉiutagaj zorgoj, plezuroj kaj strebadoj.
Esperanto - Laŭte!, Cargue Sac, FR-47470 Beauville